

Bulgara **ESPERANTISTO**



3—4

1975

E N H A V O

* * * Tridekjara jubileo de la homara libereco	1
Lijana Daskalova. Treptow-parko	3
Ivan Rudnikov. Gratulo por la festo de la virino	3
Pavel Veĵinov. La dua roto	4
Arkadij Vaksberg. Ili estis 17-jaraj	8
Taŝo Karapetrov. Ljubomir Zafirov Ĥaĝimiĥajlov	9
Ĥrima. Nia sekretario	11
Stojan Kostadinov. Kiel oni povas mortigi Esperanton	14
* * * Todor Pavlov 85-jara	15
M. Milev. Rememoro pri Todor Pavlov	16
Atanas D. Atanasov. La virinoj en la bulgara Esperanto-movado	16
Marija Stojanova. Vigla Esperanto-agado en Preslav	19
A. Ĥarkovskij. La Moskva internacia	23
* * * Deklaracio de la Japana Pacdefenda Esperantista Asocio	25
Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Interlingvistika utopiismo	26
Stojko Boĵkov. Kio mankas al niaj elementaj kursoj	28
Prodan Prodanov. „Sileziaj kantoj“ de Petr Bezruč	29
* * * La sorto de Tanja	30
Lasto Nikov. Ni kolektu poŝtmarkojn!	31
As. Grigorov. D. Denĉev. Gardu la pacon! (kanto)	32

Sur la kovritpaĝo:

La monumento de la Soveta Armeo en Treptow-parko, Berlino

Abonkotizo: jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publiĝigataj senpage.



Omaĝo ĉe la tombo de d-ro César Anjo, portugala kontraŭfaŝista batalanto kaj esperantisto, forpasinta en 1969 en Lisbono. Mesaĝon de Portugala Esperanto-Asocio legas s-ro F. Kosta.

(la foto prenitaj el „Heroldo de Esperanto“, № 1/1975)



TRIDEKJARA JUBILEO DE LA HOMARA LIBERECO

En la tuta mondo oni neniam forgesos tiun majtagon, kiam ĉesis la Dua Mondmilito, daŭrinta pli ol kvin jarojn. La frakaso de la multmilionaj Hitler-armeo, abunde armita per ĉiuspecaj bataliloj, postulis de la homaro milionojn da viktimoj: 20 milionoj da sovetaj civitanoj, 6 milionoj el Pollando, 1,7 milionoj el Jugoslavio, 600 000 el Francio, 400 000 el Usono, 375 000 el Britio ktp. Nia malgranda lando, kiu en septembro 1944 aliĝis al la antinazia koalicio kaj batalis kontraŭ la germana faŝismo, perdis sur la batalkampoj de Jugoslavio kaj Hungario pli ol 30 000 soldatojn kaj volontulojn. Krome, sur la enlanda fronto, kiu daŭris pli ol 3 jarojn (de 22. VI. 1941 ĝis 9. IX. 1944) pereis kiel partizanoj kaj ties helpantoj pli ol 27 000 kontraŭfaŝistoj, inter kiuj kelkcentoj da esperantistoj.

La milito inter Sovetunio kaj nazia Germanio estiĝis la ĉefa batalkampo. Interbatalis ne nur du armeoj, sed du ideologioj — la barbara ideologio de rasismo kaj agreso kontraŭ la homara ideologio de marksismo-leninismo. La interbatalo estis kruela, senkompata — sur la fronto kaj en la postfronto. La naziistoj kun besteca sangavido neniiĝis en la kremaciejoj de Saksenhausen, Oswiencim, Majdanek, Buchenwald, Rawensbrück k. a. milionojn da viroj, virinoj kaj infanoj.

Tamen la popoloj ne klinis la kapon — ili rezistis kiel en la koncentrejoj, tiel en la montaroj. La balkanlandanoj batalis en siaj popolliberigaj armeoj, la okcidentanoj — en geriloj, la germanaj kontraŭfaŝistoj en la kadro de „Libera Germanio“ — unuiĝo de komunistoj, socialistoj, intelektuloj kaj oficioj-kontaŭuloj de Hitler.

Fine la Soveta Armeo penetris en la bunkron de Hitler, kaj liaj generaloj kapitulacis la 8-an de majo 1945.

La venko de Sovetunio super la faŝismo havas historian signifon. Dank'al ĝi kreiĝis la monda socialisma komunaro de ŝtatoj, plifortiĝis la revolucia batalo de la popoloj amasoj en la kapitalisma mondo, kreskis potenca liberiga movado en la koloniaj landoj kaj disfalis la malamata sklaviga koloniismo. La aŭtoritato de la Komunista Partio de USSR kaj de la komunistaj kaj laboristaj partioj en la tuta mondo kreskis neimageble, la idealo de la socialismo kaj komunismo fariĝis altira por novaj centmilionaj popolamasoj.

La fina venko de la antihitlerista koalicio kreis eblecon por daŭra paco sur la bazo de kunekzistado de ŝtatoj kun diferenca sociordo. Tamen iuj okcidentaj ŝtatestroj — aŭtoroj de la doktrino de „malvarma milito“, entreprenis paŝojn kontraŭ la firmigo de la mondpaco. Pli ol 20 jarojn daŭris la politikaj intrigoj kontraŭ Sovetunio kaj la socialismaj landoj, sed la imperiistoj nenion gajnis. La socialismaj ŝtatoj ĉiuflanke prosperis, kaj ilia

influo en la mondo plikreskis. Fine iuj saĝaj ŝtatestroj en Okcidento eliris el la marĉo de la „malvarma milito“ kaj komencis intertrakti kun sovetaĵ gvidantoj pri ekonomiaj, financaj kaj sciencaj problemoj. Kompreneble, la ĉefa problemo restas la malebligo de nuklea milito, kiu povus neniigi la homan vivon sur nia planedo.

La bulgaraj esperantistoj plenforte subtenas la konsekvencan pacpolitikon de Sovetunio kaj de la ceteraj socialismaj landoj, inter kiuj ankaŭ de nia supreniranta socialisma patrujo.

Nia popolo renkontas la 30-an datrevenon de la historia venko super la faŝismo kun rimarkindaj sukcesoj en ĉiuj regionoj de la vivo, kulturo, arto kaj scienco, realigante la Sesan Kvinjaran Ekonomian Planon kaj preparante sin por inda renkonto de la XI-a Kongreso de la Bulgara Komunista Partio.

La bulgaraj esperantistoj kiel parto de sia popolo plenumas inde sian devon sur la ekonomia kaj kultura kampo.



HONORA VERDA TABULO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

Aktive laboris kaj kolektis laŭdindan nombron de abonoj al nia organo por 1975:

1. KIRIL KALĈEV de E-Societo „Espero“ en Loveĉ — 85 abonojn.
2. PAUN NESTOROV de E-Societo „Roza Valo“ en Kazanlâk — 65 abonojn.
3. NIKOLA GODEV de E-Societo „Stoju Kalpazanov“ en Velingrad — 44 abonojn.

La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ dankas tiajn konsciajn samideanojn!

Sekvu ilian ekzemplon! Abonu! Abonigu plue! Sumojn sendu rekte al la asocia kancelario!

NI NEPRE ATINGU 5000!

Sur la fotoj: K. Kalčev kaj P. Nestorov



TREPTOW—PARKO
de Lijana Daskalova

*Al la eterna memoro de la sovetaj
soldatoj, pereintaj por la libe-
rigo de Berlino.*

Treptow-parko, Treptow-parko —
kvin mil mortaj . . .
Lumas betuloj,
ne blankaj, sed sangaj.
Junaj betuloj,
dudek-jaruloj —
ne betuloj,
sed junuloj
iamaj!

Estas la samaj
rusaj junuloj
kun verdaĵ okuloj,
blondaj kaj altaj!
De la kamparo
ili eniris
en la altaron
de l'sinofero.

Patrinoj iliaj
ĝis nun atendas
la unue-naskitojn —
la siajn, la verdajn. . .
Iliaj patrinoj atendas konstante,
atendas senfine, kvankam sciante:

estas park' en Eŭropo, nomata
Treptow,
tie susuras betuloj kun rusa
kortremo,
tie kuŝas junuloj kun blondaj
hararoj,
en junajn betulojn kvazaŭ sonĝe
sorĉitaj. . .

Treptow-parko —
altar' de l'libero!
Treptow-parko —
rusa sang' por Eŭropa tero!
Al Eŭropo malsana, mortinta, milita
estis sango transfuzita,
sango soveta, skarлата!
Ne forgesu, ho vi okcidentaj
regantoj,
pri tiu sanga ofero, pri tiuj
sangodonintoj!

Treptow-parko —
monumento de venkintoj!
Treptow-parko —
kvin mil junaj vivdonintoj!

El la bulgara: Asen Grigorov

GRATULO POR LA FESTO DE LA VIRINO
de Ivan Rudnikov

Bukedon_prenu
el diantoj blankaj,
plukitaj sub la frumatena sun',
bukedon el tener',
ridetoj ĉarmaj,
bukedon radiantan
de la lum'.
Ĉar multaj revoj
nin al vi venigas,
ĉar ĉie ĉiam
estis vi kun ni,
ĉar estas kredo vi por ni,
al ni inspiron, espero,
forton donas vi.
Nin ame vi instruas
en klasĉambroj,
vi estas en la viv',
en kosma mond',
ĉar estas vi printempo,

kanto, stelo
kaj amo, kiu brulas
ĝis la tomb'.
Ni sentas vian koron
en la floroj
kaj amas vian
vibron de l'anim'.
Salutojn helajn plej
kaj plej sincerajn
al vi —
fratino, panjo kaj edzin'!
Ĉi florojn prenui
kaj feliĉa estu,
kaj lumu per l'eterno
de madon',
ĉar nia amo
en la floroj lumas
kaj lumas
nia danko kaj sindon'.

El la bulgara: Asen Grigorov

LA DUA ROTO

de PAVEL VEJINOV

(fragmento)

Post duonhoro la bataliono denove atakis. Malgraŭ ĉiuj anticipaj rimedoj la dua roto denove sola antaŭeniĝis kaj impete sin ĵetis sur la germanajn tranĉeojn. La germanoj ne ĝisatendis la baton per bajonetoj kaj rapide retirigis, sed flanken! — leŭtenanto Manev rimarkis tion — ne antaŭen! Dum li hezitis, ĉu daŭrigi la persekutadon aŭ atendi la baton de la apudaj grupoj, okazis io plej neatendita — la germanoj furioze kontraŭatakis el la du flankoj kaj restarigis la breĉitan fronton. La dua roto, kiu tiel brile estis farinta la atakon, subite montriĝis deŝirita kaj izolita en la germana postfronto.

Leŭtenanto Manev haltigis la movadon de la roto, unuafoje konfuzita kaj embarasita. Kion li povis fari en tiu ĉi situacio? Dum li nerve mordis la lipojn, sur la germanajn tranĉeoj denove plenforte ekŝutiĝis la fajro de la bulgara artilerio. Nenia dubo — la germanoj estis rebatintaj la atakon de la aliaj du grupoj kaj nun la artilerio ŝirmis ilian retirigon. Sed kion enreprenu li? Reiri, ataki la germanojn dorse, denove breĉi sub la furioza elflanka fajro, poste daŭrigi la retirigon, en la dorso kruele vipata de la germanaj mitraloj kaj minjetiloj — kaj ĉion ĉi sola? Tiukaze ĉu li povus revenigi almenaŭ unu plotonon sur la elirpoziciojn? Dubinde! Tamen alia solvo ne estis, ne, ne estis alia solvo! La fajro de la germanoj kontraŭ ilin plifortiĝis, inter la arbustoj komencis videbliĝi la verdetaĵ uniformoj. Oni ne devis perdi tempon, ĉiu minuto estis kara! En tiu momento de ie aperis Ceno kun laca, sed trankvila kaj decida vizaĝo.

— Sinjoro leŭtenanto, — li raportis per sia egala voĉo, — tie, kie ni an-

taŭ nelonge breĉis, nun staras du motorizitaj germanaj kanonoj.

„Senelira situacio ne ekzistas! — pensis klare la leŭtenanto. — Dum oni vivas — senelira situacio ne ekzistas!“

— Tute egale! — li diris trankvile. — Ni breĉos!

— Malfacile ni breĉus, sinjoro leŭtenanto! Kaj eĉ se ni breĉus — poste io pli malbona nin atendas!...

Leŭtenanto Manev ekrigardis mirigite la junulon.

— Nu, kion, — ĉu ni kapitulacu? — li demandis kolere. — Kion vi volas diri?

— Laŭ mi, ni devas iri antaŭen, sinjoro leŭtenanto... Antaŭen, en la postfronton de la germanoj...

— Ĉu vi frenezas? — kriis ekscitite la rotestro kaj tuj komprenis — tiel klare kaj simple komprenis, ke lia koro ekstremsis de ĝojo.

— Jen tiu altaĵo, sinjoro leŭtenanto, — parolis same tiel trankvile la junulo. — Ĝi distancas pli-malpli duonkilometron...

Leŭtenanto Manev eĉ ne ekrigardis al ĝi — li konis ĝin bonege laŭ la karto, krome nefoje ĝis nun ĉirkaŭrigardis ĝin per la binoklo. Estis ronda, sufiĉe kruta altaĵo — kaj versaĵne fortikigita, se oni juĝas laŭ ĝia komanda situacio.

— Bonega ideo! — li ekkriis kaj tute neatendite por si mem brakumis la junulon. — Vi mem eĉ ne imagas, kia bonega ideo ĝi estas!

... En la unua momento la soldatoj iom depremite kaj nevolonte ekiris antaŭen. En iliaj maltrankviligitaj okuloj la leŭtenanto kvazaŭ legis: „Ne tien... ne en tiu direkto... Al la niaj... pli bone al la niaj, eĉ je la prezo de ĉio!“ Sed ne estis eble kun-



venigi ilin nun, fari antaŭ ili paroladon.

— Pli vigle! — li komandis abrupte. — Rapidigu la paŝon!

Survoje ili tre facile dispelis rezervan hungaran duonroton, kiu, vidinte la fremdajn soldatojn, supozis, ke ĝi restis sola kontraŭ la malamiko, kaj forkuris. La altaĵo estis okupita de germana dekduopo. Ne haltante eĉ por momento la soldatoj de la dua roto sin ĵetis furioze al la fortikaĵo kaj ekrampis sur la krutaĵo. Oni aŭdis mallongan kaj anhelitan „hura!“, ektondris grenadoj kaj la konsternitaj germanoj, versaĵne ekpensinte kiel la hungaroj, ke ili restis solaj kontraŭ ofensivo de la bulgaraj ĉenoj, turnis la dorson. Bandera¹ la unua aperis sur la altaĵo kaj muntinte rapide mitralon tuj ekpafis kontraŭ la vivrestintajn germanojn. Kelkaj verdetaĵ uniformoj eksaltis kaj falegis sur la junan herbon, aliaj ĵetis la pafilojn.

Nun jam estis sufiĉa tempo por rigardi sian insulon meze de la germana maro. Leŭtenanto Manev ĉirkaŭiris rapide la altaĵon kaj restis kontenta: tiel bonan fortikaĵon ĝis nun li ne vidis. De tri flankoj la altaĵo estis zonita per du vicoj da tranĉeoj, akraj eskarpoj faris la fruntan flankon necedbla, kaj la solide konstruitaj bunkroj estis fidinda protekto eĉ kontraŭ artillerio. Tri bunkroj kun en ili muntitaj kaj ŝargitaj mitraloj finis la sistemon de fortikaĵoj. Ĉiupaŝe oni vidis la postsignojn de la forkurintaj germanoj — kuŝis tornistroj, kaskoj, kestoj da mitralbendoj, malplenaj boteloj, kestoj da provianto kaj eĉ unu radiosendilo. En la komanda blendaĵo sur malalta polurita tableto, alportita ĉi tien neniue scias de kie, kuŝis manĝaĵo, kiun oni ankoraŭ ne komencis manĝi — salamo, kaĉkaval², konservaĵoj, kelkaj pecoj da ĉokolado kaj boteloj da vino kun belaj buŝoj en stanfolio.

— Ni malhelpis la tagmanĝon de la fricoj³, — diris Bandera kaj ekrodis pecon da ĉokolado. — Ĝi sidigis al ili en la gorgo...

Leŭtenanto Manev ankoraŭfoje ĉirkaŭiris la altaĵon kaj donis siajn lastajn ordonojn

— Nun ili bonvolu! — li diris al Ceno, kiu dum la tuta tempo iris post li kaj ĉirkaŭrigardis ĉion per siaj seriozaj okuloj. — Bone ni renkontos ilin.

— Ĉi tie ni povus elteni eĉ tutan semajnon, sinjoro leŭtenanto, — diris kun detenata gojo la soldato — Ni havas ĉemane ĉion, kion ni dezirus.

— Krom akvo, — rimarkis la leŭtenanto, eksentinte sekecon en la gorgo.

— Ne estos necesa multa akvo, — diris konvinkite la soldato. — La niaj baldaŭ faros breĉon...

— Nun ni similas paraŝutistojn, — ekridis la leŭtenanto. — Longe ni memoros...

Jam dum li supreniĝadis en la blendaĵon, sur la altaĵo komencis fali minoj...

Kiajn taskojn oni povus starigi al si? Sendube — forpuŝi la germanajn atakojn, se la malamiko decidus eltiri la danĝeran dornon el sia kalkano; konservi la homojn por pluaj decidaj bataloj. Jes, tiuj ne estas tute facilaj taskoj, ne estas tute facilaj taskoj...

Ceno denove eniris la blendaĵon kaj palpebruminte en la krepusko, raportis:

— El la roto mankas dekkvin personoj, sinjoro leŭtenanto... Krome kvin homoj estas vunditaj...

— Ĉu oni rimarkas ian movadon de trupoj?

— Ili ankoraŭ estas malproksime, sinjoro leŭtenanto. Evidente, estas varme ĉe la fronta linio, tial oni ne povas apartigi fortojn por ni...

¹ Bandera — kromnomo de soldato.

² Speco de fromaĝo, flava.

³ Fricoj — tiel la bulgaroj moke nomis la germanajn soldatojn.

La fajro sur la altaĵon intensiĝis, sed la germanoj entreprenis atakon apenaŭ post du horoj. La atakantoj ne estis pli ol cent homoj, kaj la defendantoj ilin rebatis facile — ne uzante grenadojn. Estis nur unu vundito — Aleksi. Peco de mino trafis lin en la stomako. Kiam leŭtenanto Manev venis por vidi lin, li kuŝis flava kaj senpova en la komandblendaĵo kaj mallaŭte ĝemis. Vidinte la oficiron, Aleksi eksilentis kaj direktis al li siajn malsereniĝintajn suferantajn okulojn.

— Ĉu la vundo estas en la stomako? — demandis sence la komandanto, malgraŭ ke li bonege sciis, ke la vundo estas ĝuste en la stomako.

— Jes, sinjoro leŭtenanto, — respondis la soldato, ne flankigante de li siajn malgajajn okulojn.

— La sanitaristo diras, ke la vundo ne estas danĝera... se, kompreneble, vi kuŝas senmove... Baldaŭ la niaj breĉos, kaj tiam... iu hirurgo faros al vi operacion...

— Jes, mi scias, sinjoro leŭtenanto, — rediris ĝeme Aleksi. — Se vi ne allasos ilin ĉi tien, mi ĝisvivos...

— Ni ne allasos ilin... Vi bone scias, ke ni ilin ne allasos...

— Jes, mi scias, sinjoro leŭtenanto...

Ĉe la pordo leŭtenanto Manev kunpuŝiĝis kun Stojan, kiu alkuris por vidi sian vunditan amikon. Li haltis por momento, salutis, tuŝante per fingroj la vizieron kaj diris anhelante:

— Tanko moviĝas kontraŭ nin, sinjoro leŭtenanto...

— Tanko?

— Tanko... Per la propraj okuloj mi ĝin vidis... Mi tuj revenos, sinjoro leŭtenanto...

Tamen ĝi ne estis tanko, sed motorizita kanono. Proksimiĝante al la altaĵo, ĝi direktis sian longan faŭkon kaj komencis pafi malrapide kaj metodike. Post kvaronhoro, translokiĝante kaj atente direktiĝante, la kanono detruis la tri bunkrojn, sed la soldatoj

sukcesis elporti la germanajn mitralojn el la lastaj du. Senpovaj fari ion ajn kontraŭ la kirasitan monstron, ili furioze insultis kaj minacis.

Ĉirkaŭ la tria kaj duono sur la ŝoseo el la vilaĝo dekstre de la altaĵo montriĝis ses kamionoj, ŝargitaj per SS-anoj (esesanoj) en nigraj uniformoj. Ili haltis malproksime, poste disfaldiĝis kaj okupis pozicion kune kun la soldatoj, rebatitaj en la unua atako. Ĉi-foje la situacio estis multe pli serioza. La malamiko multiĝis kelkoble, krome ĝi disponis pri la motorizita kanono, kiu povis servi ankaŭ kiel kirasita ŝildo, post kiu la nigraj sturmuloj povus penetri al la supro de la altaĵo.

La atako komenciĝis post duonhoro. La germanoj atakis samtempe de ĉiuj flankoj, kaj la kanono malrapide ek-rampis al la supro. Malantaŭ ĝi kiel nigra vosto grimpis la germanoj, premantaj aŭtomatajn pafilojn en la manoj. En la tranĉeo, ĉe la minacata loko, ekstaras Ceno kun ligaĵo da grenadoj en la manoj. Lia vizaĝo estis serioza kaj streĉita, liaj okuloj brulis. La kanono proksimiĝis pli kaj pli al la tranĉeo, estis aŭdebla ĝia tondra mortormuĝo, minace krakegis la raŭpoĉenoj. Kiam la ŝtala monstro tute proksimiĝis, Ceno facile elrampis sur la tranĉean remparon kaj svinginte forte la manon, ĵetis la ligaĵon da grenadoj sub la kanonraŭpojn. Oni aŭdis la teruran tondron de la eksplodo — Ceno kliniĝis kaj ĵetis duan ligaĵon da grenadoj. La kanono ekstaris sur unu loko, sed la motoro ankoraŭ funkciis, sufokiĝis en raŭka benzina tusado. Kaŝite bone sur unu el la flankoj, Bandera furioze ekpafis per sia malpeza mitralo, kaj la esesanoj malantaŭ la dorso de la moviĝanta kanono rapide malaperis diskurante.

En la tumulto neniu rimarkis, kiel Ceno kliniĝis sur la remparo kaj senbrue malsuprenfalis sur la fundon de la tranĉeo. La germanoj atakis de



ĉiuj flankoj, pafis per aŭtomatoj kaj furioze kriegis nekompreneblajn germanajn insultojn. La kunpuŝiĝo estis mallonga, sed eksterordinare kruela. Iuj el la esesanoj sukcesis penetri eĉ en la tranĉeojn kaj estis mortigitaj tie, aliaj estis repuŝitaj per la grenada hajlo. La deklivoj de la altaĵo kovriĝis per verdetaĵoj kaj nigraj uniformoj. La batalantoj de la dua roto finmortigis ilin per siaj fusiloj, pafis per la mitraloj post la cedantajn ĉenojn kaj triumfe kriegis. Malproksime, sur la granda fronto, denove kun timiga forto ektondris obtuze la bulgara artilerio.

Bandera la unua rimarkis Cenon, kiu senmove plu kuŝis sur la tranĉea fundo. Li lasis la mitralon, alkuris timigite kaj malrapide turnis surdorse sian amikon. Ekstarinte li estis pala kiel mortinto, kaj liaj lipoj tremetis.

— Murdita! — li diris flustre.

Kaj ĉar neniu aŭdis lin, li kriis laŭte:

— Ceno estas mortigita!

Leŭtenanto Manev alkuris inter la unuaj. La soldato estis mortigita tuj — densa aŭtomatpafila fasko estis terure traborinta lian bruston. La larĝa, bela kaj sana vizaĝo estis kovrita de morta palo, la vitriĝintaj okuloj ŝajne ankoraŭ rigardis akre kaj indigne. Unu el la kugloj estis disŝirinta la gorgon kaj la brusto estis kovrita de koaguliĝinta sango. Frakasite, kun rigardo nebulita de larmoj, la rotestro ĉirkaŭrigardis la malserenajn, minace kuntiritajn vizaĝojn de la soldatoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭe.

— Elportu lin el la tranĉeo! — li ordonis per mallaŭta voĉo.

Oni transportis la heroon sur la supron de la altaĵo kaj metis lin sur la verdan herbon — malvarma, senmova, belega. Super li brilis tenere kaj malgaje la lazura-purahungara ĉielo, milda venteto karesis la rigidan vizaĝon. Dimitro sternis sur la teron blankan naktukon kaj komencis loki sur ĝin la personajn posedaĵojn de la mortigito, kiujn li kun dolore glacia

vizaĝo eligadis el la poŝoj. Kaj subite ĉiuj ekstremis terurite — en siaj manoj la soldato tenis foton kun larĝa kemia stampo sur la malsupra rando. Sur la foto liphara kaj rikananta ĝendarmo apogis sin per la dekstra mano sur fusilo kaj en la maldekstra tenis ĝis la gorgo detranĉitan blondan junulan kapon. La vizaĝo de la senkapigito estis al ili ĝis doloro konata kaj proksima — la vizaĝo de la heroo, kiu nun kuŝis kun trapafita brusto sur la herbo. Sen diri la nomon, ĉiuj sciis — tio estis la alia frato, pereinta en la partizana batalo.

Oni kovris la korpon de la heroo per soldatmantelo kaj metis la foton sur lian bruston. Nun sub la pura ĉielo ili kuŝis duope — la soldato kaj la partizano, — kuŝis kvietaj kaj senspiraj kaj povis nek vidi, nek kompreni, kiel la koroj de la soldatoj, turmentitaj kaj fummakulitaj en la bataloj, mallaŭte ploris, kiel ili ĵuris fidelecon, kiel ili dronis en larmoj, amo, malamo kaj sindonemo. Leŭtenanto Manev leviĝis silente ĉe la kadavro — iom malalta, malheliĝinta kaj emociita:

— Kamaradoj, pereis la bonega soldato, pereis nia kamarado en la batalo kontraŭ la malamikoj de la homaro... Ni kliniĝu antaŭ lia sinofero...

Kaj okazis io neordinara kaj mirinda — kiel en la legendoj! Sur la supro de la verda, al neniu konata hungara altaĵo, en la postfronto de la malamikoj, ĉirkaŭite de ĉiuj flankoj de morto kaj furiozeco, sub la lazura, fora, pura ĉielo la batalantoj de la dua roto silente genufleksis. La tenera, milda venteto surblovis iliajn varmajn vizaĝojn, plenigis iliajn naztruojn per la dolĉa humidaodoro de la ebenaĵo. Kaj ie tre proksime kun furioza kaj obtuza tondro kreskis la batalo, la trupoj impete disŝiris la germanan fronton kaj venis tien ĉi, venis...

El la bulgara: Kunĉo Vălev



Verkistoj, 17-jaraj, iras al la fronto. Nun ili raportas al la hodiaŭaj 17-jaruloj.

Plenplena estas la halo en la Centra Domo de la Literaturistoj en Moskvo. Kia sensacio altiris la atenton de tiom multaj homoj, precipe lernantoj kaj studentoj?

Ĉi tiu vespero vere povas esti nomita ~~sensacia~~, malgraŭ ke ĝi entute rigardas al la pasinteco, al tiaj malproksimaj jaroj, kiam tiu ĉi halo ankoraŭ ne ekzistis. „Ni estis 17-jaraj“ — parolis la titolo de la vespero. 17-jaraj estis konataj nun verkistoj, kiuj iris al la fronto en 1941, ĵus ŝanĝinte la uniformon de lernantoj per soldatmantelo. Hodiaŭ ili deziris raporti, rakonti al la hodiaŭaj 17-jaruloj pri tiu mirinda ŝtorma tempo, kiam estis decidata la sorto de tiuj, kiuj nun sidis en la halo.

Miloj da verkistoj foriris tiam al la fronto — 40% de la kreantoj de nia multnacia literaturo. Kvarcent el ili ne revenis al siaj hejmoj. Ne revenis Evgenij Petrov — li forbrulis en aviadilo, paftrafita de la germanoj. Ne revenis Arkadij Gajdar — ŝirmante cedantan soldattrupon, li pereis malantaŭ la mitralo. Pereis Vladimir Stavskij, Jurij Krimov, Josif Utkin kaj multaj aliaj batalkamaradoj. Kamaradoj laŭ armilo kaj plumo.

Tiuj, kiuj iris al la fronto, ankoraŭ ne estis verkistoj, kvankam kelkaj provis verki kaj lasis brilan spuron per siaj verkoj, publikigitaj, bedaŭrinde, post ilia morto. Multaj el ili estis postmorte akceptitaj en la Asocio de Verkistoj. Mi memorigos nur la nomojn, kiujn Leonid Breĵnev menciis inter la herooj, falintaj bravule en la batalo por Novorosijsk — Pavel Kogan, kies kanto „Brigantino“ supervivis sian tempon kaj ankaŭ nun estas ŝatata de la junularo, kaj Anatolij Lunaĉarskij — talenta poeto kaj kritikisto.

Hodiaŭ en la membraro de l'Asocio

de Verkistoj en Sovetunio estas 87 literaturistoj, kiuj foriris al la fronto 17-jaraj, eĉ 16-jaraj. Jurij Bondarev, aŭtoro de la konataj romanoj „Lastaj salvoj“, „Silento“, „La du“, „Brulanta neĝo“; Vasilij Bikov — ĉiu lia novelo fariĝas literatura evento; Vladimir Bogomolov — aŭtoro de „La infanaĝo de Ivan“, „Zosja“ kaj la nova romano „Dum aŭgusto kvardek kvara“, kiu fariĝis evento de la jaro.

Parolas Konstantin Vanshenkin, aŭtoro de dramverkoj, transpasintaj malproksimen la limojn de nia lando: „Mi amas vin, vivo“, „Aljoŝa de Plovdiv“ kaj multaj aliaj. Li fariĝis soldato 16-jara, poste ricevis la titolon de gvardia serĝento, ekstaris ĉekape de paratutista dekopo. Ami la vivon — por li tio ne estas nur vorto. . .

Komandanto de rotparto, leŭtenanto Grigorij Baklanov hodiaŭ estas unu el la plej elstaraj sovetaj prozistoj. Preskaŭ ĉio, verkita de li, estas dediĉita al la milito. Ĝin oni tradukis en multajn lingvojn. Tio ne estas hazarda. Baklanov militis de la 22 de junio 1941 ĝis la 9 de majo 1945. „Mi sentas, — li diris, — nepageblan ŝuldon al miaj samaĝuloj, kiuj ne revenis de la militkampoj. Ja nur por la liberigo de Pollando falis 650 000 sovetaj soldatoj. Tio signifas, ke de la orienta ĝis la okcidenta polaj limoj sur ĉiu metro kuŝas mortigito.“

Legas versaĵojn kaj plenumas siajn kantojn Bulat Okuĝava. Li estas vestita en malnova soldata ĉemizo. Kaj sub la ĉemizo — postsignoj de vundoj, cikatroj de la milito. . .

Lin anstataŭas homo kun neordinara biografio — la heroo de Pollando, la prozisto Ovidij Gorĉakov. La ekranigon de lia novelo „Mi altiras la fajron sur min“ vidis per la televidiloj milionoj da spektantoj en multaj lan-



doj. Gvatesploristo, ĉiujn kvar jarojn de la milito estinta en la postfronto, plenumante specialajn taskojn de la ĉefstabo, Gorĉakov malmulte kaj nevolonte parolas pri si. Li rakontas pri Zoja Kosmodemjanskaja, Vera Vološina, Kostja Pahomov — bravaj sovetaĵgvatesploristoj. Ili ĉiuj estis edukitaj de Artur Sprogis, helpanto de la legendeca Jan Berzin, indaj posteuloj de Dzerĝinskij kaj liaj kunbatalantoj, per siaj vivo kaj morto pruvintaj sian sinoferan fidelecon al la patrolando.

Kaj en la halo sidis Artur Sprogis men., jam grizhara veterano — ĉekisto¹, edukinta heroojn. Li rigardis al la aŭditorio kun streĉa atento, aŭskultis la rakontanton, observis la junajn, helajn vizaĝojn. En liaj okuloj briletis larmoj. . .

Arkadij VAKSBERG

(El ĵ. „Oteĉestven Front“, 67/1975)

¹ Aganto de ĈK (Eksterordinara Komisiono) — organo por batalo kontraŭ la reakciaj fortoj post la Oktobra Revolucio.



LJUBOMIR ZAFIROV HAĜIMIHAJLOV

Antaŭ 70 jaroj, komence de 1905, en Kjustendil naskiĝis Ljubomir Haĝimihajlov — unu el la fondintoj de la



junkomunista organizaĵo en la urbo kaj ĝia unua sekretario. Haĝimihajlov

estis arda esperantisto.

Jam suĉinfano li kaj lia 2-jara frateto Aleksandro restis sen gepatroj. Ili kreskis sub la zorgoj de siaj gefratoj Solunka kaj Petro. Ljubomir aŭ Mireto, kiel oni karese nomis lin, frue komencis viziti la lernejon — jam 6-jara. Li estis ege kapabla infano, honkora, kvieta, enpensigema.

En 1918 oni fondis socialisman rondeton en la urbo kaj Ljubomir, jam gimnaziano, vigle partoprenis ĝin. La rondanoj disvolvis aktivan marksistan propagandon. Zafir Sokolĉev, kamarado de Ljubomir, skribas en siaj memoroj:

„Komence de 1919 en la domo de Prokopi Davidov, instruisto en Kjustendil, ni, sep rondanoj, kolektiĝis kaj laŭ iniciato de Ljubomir kaj Dragan Prokopiev fondis la unuan junkomunistan societon en la urbo. Kiel sekretarion ni elektis Ljubomir. Laŭ lia propono la societo estis nomita „Lenin“. Dum la aŭtuno de 1919 en



la organizaĵo jam membris pli ol 70—80 gejunuloj. . .“

Ĉirkaŭpreninte la ideojn de la komunismo, trovinte sian lokon en la batalo de la laborista klaso por libero kaj homaj rajtoj, Ljubomir Zafirov fondis klubon por lernado de Esperanto, ofte prelegis, studis la verkojn de Lenin, organizis kaj gvidis la junularan revolucion movadon en Kjustendil, aŭskultis la paroladojn de Georgi Dimitrov, Vasil Kolarov, Vasil Muletarov, Stanke Dimitrov kaj Kosta Petrov, kiujn ili faris en lia naskiĝurbo.

Pro demonstracio kontraŭ la monarko-kapitalisma regpotenco Ljubomir kaj Dragan Prokopiev, laŭ propono de la polico, estis forigitaj el la gimnazio de Kjustendil.

En siaj rememoroj pri tiu tempo Ekaterina Ocetova skribas:

„Ni translokiĝis en Sofion. Baldaŭ ĉi tien venis ankaŭ Solunka, kiu edziniĝis al Dimitâr Ŝojlekov. Ili ambaŭ kaj mi estis preslaboristoj. Mireto — Ljubomir Zafirov, venis ĉe sian fratino Solunka, kiun li nomis „franjopano“. Li studis en vespera gimnazio kaj laboris. Vlado Triĉkov estis konstanta kamarado de mia frato kaj de Petro — la frato de Lubomir. Li fariĝis nedisigebla amiko ankaŭ de Mireto, kiu tiutempe lernis anglan, francan, Esperanton kaj senĉese estis en kompanio kun Hristo Smirnenski kaj Aleksandâr Ĵendov.

Nedelonge post sia alveno en Sofion Ljubomir Zafirov fariĝis unu el la amatoj de la junularo en la proleta kvartalo „Juĉbunar“. Kaj kiam en 1922 la Bulgara Komunista Partio kunvokis grandan partian kunvenon en Kjustendil, Mireto alkondukis tien 300 komso-molanojn (junkomunistojn), kiuj plej aktive partoprenis la mitingon.

En siaj rememoroj Ek. Ocetova rakontas plue:

„La 14 de septembro 1923 estis vendredo — bazartago en Sofio. Tiam la Partio organizis mitingon pro-

teste kontraŭ la kruelaĵoj de la novaj monarko-faŝistaj regantoj en la lando. La mitingo okazis sur bulvarado „Dragoman“ (la nuna „Georgi Kirkov“) kaj strato „Ekzarĥ Josif“. Vlado Triĉkov kaj Ljubomir Zafirov mortigis la estron de la rajda polico kaj lian adjutanton. La vesperon venis en nian hejmon Vlado Triĉkov, demandis pri Mireto. La sekvan vesperon tiu venis anhelante.

— Min persekutas agentoj. Ĉu venis Vlado? — li nur demandis kaj eliris.

Kelkajn tagojn poste, dum la Septembra Ribelo, oni arestis mian fraton Georgi. Post 3—4 tagoj aŭdigis sin ankaŭ Ljubomir. Arestita estis ankaŭ lia frato Petâr. . .“

Persekutite, Ljubomir Zafirov elmigris en Jugoslavion.

Deŝirite de sia patrolando, la juna komunisto sin donis al traduklaboro, sed ne forgesis sian suferantan popolon. Kelkfoje li venis nelegale Bulgarijon, plenumante gravajn komisionojn de la Eksterlanda Buroo de la Bulgara Komunista Partio.

La 18 de februaro 1925 li skribis el Niŝ al sia kamarado en Germanio:

„Kara Straŝo,

Via letero kun la du portretoj trafis min en preskaŭ senkonscia stato. 50 tagojn mi malsanis pro bronĥopneŭmonio. La alta temperaturo de 40—41° detruis min. Mi similas mortinton. . .

Straŝo, mi havas deziron veni en Germanion, sed mono por vojaĝelspezoj mankas. . .

Nun mi estas tro malforta. Skeleto en haŭto.

Sinceran saluton. Via Mire. . .

Pri la plena agado de Ljubomir Zafirov ni ekscias el artikolo de Arsenij Ŝojlekov, publikita en ĵ. „Pirinŝko Delo“ antaŭ kelkaj jaroj:

„Konsiderante la komenciĝintan revolucion malfluson, Ljubomir Zafirov bone komprenis, ke nova ribelo en la



momento estas tute neebla, tial en la gvidantaro de la elmigrintoj en Niŝ li subtenis Vladimir Poptomov kaj Aleksis Veličkov, kiuj deklaris sin kontraŭ la maldekstra sekteca devio en la Partio. Estas sciata, ke tiu kurso, nekonforma al la socipolitikaj ŝanĝoj en la lando post la Septembra Ribelo, kondukis al la atenco en la sofia katedralo kaj tiel donis motivon al la faŝisma potenco likvidi la plej bonajn, la plej fidelajn kadrojn de la Komunista Partio. Veninte en Bulgarion el

Jugoslavio kun partiaj taskoj, Ljubomir Zafirov pereas en la unua duono de aprilo 1925“.

„Senspura malaperinta“ — oni skribas per krajono en la polica dosiero. Tiel estas skribite kontraŭ miloj da homoj. Sed ĉu ili malaperos el la memoro de la popolo. Eterne vivas tiuj, kiuj fordonas sian vivon por la popola bono kaj feliĉo.

Taŝo Karapetrov

*materialo disaŭdigita de Radio Sofia
en januaro 1975*

Niaj veteranoj

NIA SEKRETARIO

Rememoroj de ĤRIMA

Iam, proksimume antaŭ 45 jaroj, nia lando prezentis tion, kion nun prezentas Ĉilio: tra urboj kaj vilaĝoj furio-



zis faŝistaj bandoj, senkompate murdis siajn politikajn kontraŭulojn kaj rabis ilian havaĵon. Malgraŭ la faŝista teroro

la bulgara laborista klaso sub la gvido de la Bulgara Komunista Partio plubatalis por homaj rajtoj kaj pli bona vivekzisto. Ankaŭ la klaskonsciaj laboristoj-esperantistoj estis en la vicoj de la batalantoj.

Al tiuj progresemaĵoj esperantistoj apartenis ankaŭ la muntisto en la lokomotivriparejo de Plovdiv Stojan Kostadinov, la nuna sekretario de BEA. Unuafoje mi vidis lin en la aŭtuno de 1927, kiam kun kelke da esperantistoj li ekskursis al Asenovgrad, kie mi tiam loĝis. Nin, junajn esperantistojn, impresis ĉio esperantista kaj ni kun aparta intereso rigardis la diversajn E-insignojn sur la brustoj de plovdivanoj. Plej impresis min du insignoj kun ruĝa rondo. Ilin portis Ivan Armin, mia kornato de infanaĝo, kaj Stojan Kostadinov. Scivole ni kun David Sasonov demandis, kial la du insignoj ne similas al la ceteraj.

— Ni estas ruĝaj esperantistoj, — respondis iom fiere Stojan. — Ni portas la insignon de SAT — internacia laborista Esperanto-asocio.

Dank' al Stojan kaj Ivan Armin ni, junaj kaj novaj esperantistoj en Asenovgrad, eksciis pri la ekzisto de LEA (Laborista Esperanto-Asocio) kaj SAT

(Sennacieca Asocio Tutmonda). Tiu lasta tiam estis unuecfronta organizaĵo kaj eldonis ankaŭ marksisman literaturon.

Stojan kaj Ivan havigis al ni la adresojn de la Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo kaj de la germana LEA. Pere de ili ni komencis ricevi E-gazetojn kaj literaturon el Sovetunio kaj Germanio. Ankaŭ adresojn de sovetaĵ esperantistoj ni ricevis kaj komencis vigle korespondi. Niaj leteroj aperis en diversaj ruslingvaj gazetoj. Ĉion, kion ni ricevadis el Sovetunio, ni tradukis por la komunistoj en Asenovgrad. Tio ege plaĉis al niaj kamaradoj kaj ili ĉiel helpis nian agadon. Ĝi daŭris ĝis kiam la germana E-movado estis eksterlegigita de la hitleranoj.

La kontaktoj kun Stojan kaj Ivan helpis al ni fondi laboristan E-societon en nia urbo. En 1929 ni partoprenis aktive la starigon de bulgara LEA kaj disvastigis regule ties organojn „Balkana laboristo“ kaj poste „Mejdunaroden Rabselkor“.

Je la fino de 1929 Stojan malaperis el niaj vicoj. Kune kun la esperantisto Asen Toromanov el Asenovgrad li estis arestita kaj inkviziciita en la policejo de Plovdiv. La faŝista tribunalo kulpigis Stojan kaj Ivan Armin kiel internaciajn konspirantojn, ĉar en iliaj hejmoj oni trovis eldonaĵojn de SAT kaj LEA. La komsomolanoj kondutis kuraĝe antaŭ la faŝista tribunalo kaj kiam la ĉefjuĝisto legadis la severan verdikton, Ivan, Stojan, Asen kaj la ceteraj en katenoj vokis: „For la faŝistan diktaturon! Vivu la Komso-molo kaj la Komunista Partio!“

Tuj post la tralego de la verdikto Stojan elpoŝigis ruĝan flagon kun surskribo „BKP — BKMS“ kaj la komunistan signon — krucitaj martelo kaj rikoltilo. La flago flirtis super la kapoj de la arestitoj, kiuj kantis la

„Internacion“. Stojan estis kondamnita al 12¹/₂ da jaroj de mallibereco kaj per monpuno de 350 000 levoj.

Post trijara restado en prizono oni liberigis Stojan. Mi vidis lin denove en la printempo de 1933. Dum tiu jaro la germana faŝismo triumfis. Mi estis delegito de la komunistoj de Asenovgrad kaj partoprenis distriktan konferencon en la sinoj de Rodopi-montaro. Stojan estis unu el la organizantoj de la konferenco. Li estis armita per bombo kaj pistolo kaj mi vere fieris, vidante tian revoluciulon kun verda stelo sur la brusto. En tiu konferenco oni parolis pri la taskoj de la klasbatalo en la nuna etapo.

Post unu jaro ankaŭ la bulgaraj faŝistoj faris puĉon kaj denove ekfuriozis la faŝista diktaturo. Iutage (mi laboris jam en Plovdiv) min invitis la esperantisto Todor Iŝev al protesta kunveno kontraŭ la puĉistoj. Kunvenis sur la strato kelkdekoj da laboristoj. Stojan Kostadinov ekstaris sur ŝtono kaj komencis paroladon kontraŭ la faŝista teroro. Lia parolado tamen estas interrompita de bando da policianoj, kiuj dispelis nin kaj arestis la oratoron. Oni provis juĝi lin, sed nenio rezultis. Ĉiuj ni deklaris, ke en sia parolado li defendis la Konstitucion de Târnovo².

Nia laborista E-movado en la distrikto de Plovdiv estis idee gvidata de BKP. Stojan kiel membro de ĝia Distrikta Komitato estis nia konsilanto. Li helpis nin reorganizi la E-movadon, kunlabori kun la neŭtralaj esperantistoj. Tion ni sukcese faris post nelegala konferenco en Rodopi-montaro, kiun partoprenis Pelin Velkov el Sofio, Hristo Kanev kaj Kr. Karucin el la distrikto de Stara Zagora, David Sasonov kaj Dimitâr Andreev el Asenovgrad, Konstantin Ĉiĉanov, Todor Sofroniev kaj

¹BKP — Bulgara Komunista Partio. BKMS — Bulgara Komunista Junulara Unuiĝo.

²La malnova bulgara konstitucio, akceptita tuj post la liberiĝo el la otomana jugo en urbo Târnovo. Malgraŭ burĝa, ĝi havis demokratian karakteron kaj la reaciaj politikaj reĝimoj en nia lando ĉiam neglektis kaj subpremis ĝin.



Nikola Stefanov el Plovdiv k. a. La delegito de Smoljan A. Spasov ne povis ĉeesti, ĉar la polico eksciis pri la konferenco kaj arestis lin.

En 1935 mi renkontis kamaradon Stojan Kostadinov en la malliberejo de Plovdiv. Tie ni — N. Stefanov, K. Ĉicanov, T. Sofroniev, Stojan Todorov kaj mi, ĉiuj membroj de la Distrikta Komitato de LEA kaj redaktoroj de PEK-servo³ kaj la stencilita gazeto „Sturmulo“, daŭre agitis inter la politikaj malliberuloj pri Esperanto. Kostadinov per sia granda aŭtoritato de gvidanta komunisto faris multon por konvinki la kamaradojn, ke Esperanto estas grava rimedo por kontaktoj inter la diverslandaj laboristoj.

Pasis jaroj . . . Kun Stojan ni renkontiĝis post la 9-a de Septembro 1944 kiel liberaj homoj. La Distrikta Komitato de BKP en Plovdiv rekomendis lin por inspektisto ĉe la Milico. Li gvidis dum kelkaj jaroj la batalon kontraŭ la „herooj de la nigra merkato“ (neleĝa komercado). Sur tiu posteno li montris sin ege honesta kamarado, ne submetiĝis al la tentoj, kiujn proponis al li iuj influhavaj kaj riĉaj nig-

³PEK — Proleta Esperanto-Korespondado

ramerkatanoj.

Venis la kvinjaraj planoj por konstruado de socialisma ekonomio en nia lando. La Komunista Partio bezonis fidelajn kaj spertajn gvidantojn sur la ekonomia kampo. Mi vidis kamaradon Stojan kiel direktoron de gravaj industrientreprenoj en Plovdiv, Karlovo, Sofio.

Tiel en batalo por realigo de la naciaj laborplanoj nerimarkite venis la jaro de emeritiĝo, kaj tio estis nova etapo por aktiva E-laboro. Ekde 1962 k-do Stojan Kostadinov agas kiel membro de CK de BEA kaj sekretario de BEA. Jam pli ol dek jarojn mi vidas lin labori por nia Movado modeste kaj senbrue, konsilante, helpante, instigante kaj entuziasmigante. Lia granda ekonomikista sperto estas utiligata en la Bulgara Esperantista Kooperativo, kies vicprezidanto li estas jam multajn jarojn.

Estas vere, ke nia E-movado prosperas dank' al veteranoj similaj al k-do Kostadinov. Ilia sindonemo estas valorega por ĝi. Kaj mia deziro estas, ke li ankoraŭ longe estu energiplena por la bono de nialanda kaj internacia Esperanto-movado!

GRAVA!

GRAVA!

La Bulgara Esperantista Kooperativo proponas al vi je reduktitaj prezoj la jenajn librojn:

1. „ELEKTITA VERKARO“ de Hristo Botev — de 1,58 levoj al 1 levo.
2. FLUGAS KANTO TRA LA MONDO (E-kantaro) — de 1,41 al 0,90 levoj.
3. LA ALIA AMERIKO de Svetoslav Minkov — de 0,24 al 0,10 levoj.
4. ADRIATIKA TEMO — de 0,16 al 0,05 levoj.
5. LERNOLIBRO DE ESPERANTO (stencilita) de Zora Hans kaj Georgi Dimov — de 1,20 al 0,50 levoj.
6. ESPERANTA KRESTOMATIO (stencilita) de Simeon Simeonov — de 1,28 al 0,60 levoj.

Geesperantistoj, profitu la grandan rabaton! Havigu E-librojn por vi kaj donace por viaj en- kaj eksterlandaj amikoj!

Vi povas mendi ankaŭ kolorkartojn kun vidaĵoj el Sofio, teksto esperantlingva, prezo 0,10 levoj.

Sumojn sendu per poŝtmandato al adreso: Bulgara Esperantista Kooperativo, str. Neofit Rilski 18, Sofio.



Per kugloj?

— Ne! Ne decas!

Per pendumiloj?

— Ne! Ne eblas!

Per batadoj, arestadoj, aliloĝigoj?

— Ne! Vi ne sukcesos! Vane vi perdos viajn fortojn! La vivo pruvis, ke nek kugloj, nek koncentrejoj, nek pendumiloj kaj prizonoj povas neniigi Esperanton. Vi certe bone scias, ke miloj da esperantistoj estis mortigitaj de la faŝismaj diktaturoj en diversaj landoj. Vi same scias pri la koncentrejoj, en kiuj sen juĝo kaj verdikto miloj da esperantistoj travivis terure pezan vivon kaj ne malmultaj el ili trovis tie sian morton. Vi nepre scias, ke multaj esperantistoj estis arestitaj, batitaj kaj pendumitaj en faŝismaj arestejoj kaj prizonoj. Sed estas evidente, ke tio ne sukcesis mortigi Esperanton. Male, en tiuj landoj, kie Esperanto en la pasinteco estis persekutata kaj malpermesata, kie la esperantistoj estis

ofendataj kaj punataj, ĝuste tie Esperanto nun estas plej disvastigita!

Ĉu vi ne kredas? Vidu Bulgarian! La lando, kie oni arestis, batis, mortpafis kaj sendis al prizonoj esperantistojn nur pro tio, ke ili estas esperantistoj. La landon, en kiu la faŝistoj mortpafis centojn da esperantistoj. Nun en tiu lando la Esperanto-movado okupas unu el la plej elstaraj lokoj en la mondo.

Tial mi denove demandas:

— Kiel oni povas mortigi Esperanton?

— Ho, tio estas tre simpla afero! Sufiĉas, ke oni balbutu Esperanton kaj kun nesufiĉe solidaj konoj instruu ĝin!

Ĉiopova dio, gardu nin de balbutantaj instruistoj, kiuj ne sufiĉe bone konas la lingvon. Gardu nin, dio, ĉar, ne estas forto, gardanta nin de tiaj „instruistoj“, kiuj persiste mortigas Esperanton.

Stojan KOSTADINOV

La Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario honoris per alta ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — I-a grado k-don Stojan Petrov Kostadinov — sekretario de CK de Bulgara Esperantista Asocio, lige kun lia 70-jariĝo kaj pro lia aktiva partopreno en la kontraŭfaŝisma batalo kaj en la konstruado de la socialismo en nia lando.

Esperanto estas tiel simpligita kaj tiel facila por lernado, ke ankaŭ laboristoj, konantaj neniun alian lingvon, nur dum kelkaj monatoj, per kelk-hora lernado, atingas tiom, kiom ili ne povus atingi ĉe la „vivantaj“ lingvoj dum tutaj jaroj.

Interesa estas la jeno. Okazis tiel, ke la novelon de Elin Pelin „La familio Gerak“ (Geracite) mi ne estis leginta en originalo kaj unuafoje mi tralegis ĝin en Esperanto. Miaj vortoj povas esti fortaj, sed preskaŭ nenio el la estetika valoro de tiu bona verko de la talenta beletristo perdiĝis en la traduko kaj mi englutis kaj travivis la libron kvazaŭ ĝi estis la originalo mem. Por mi tio solvis definitive la demandon: se Esperanto povas transdoni verkojn kiel „La familio Gerak“, ne mortigante ilin (poste mi legis ankaŭ bonajn tradukojn de Botev kaj de Smirnenski), tio signifas, ke ĝi ne estas morta lingvo, ke ĝi vivas kaj devas vivi, des pli ke ĝi estas tiel facila por lernado.

TODOR PAVLOV



Lia nomo estas delonge konata inter la pli aĝaj bulgaraj esperantistoj. Post la Unua Mondmilito, kiam Maksim Gorkij, Romain Rolland kaj Henri Bar-



busse rekomendis la lernadon kaj aplikadon de Esperanto, ankaŭ Todor Pavlov kun sia granda aŭtoritato en la vicoj de la laborista klaso kaj la progresema intelektularo rekomendis Esperanton kiel internacian lingvon.

En sia junaĝo Todor Pavlov sin dediĉis al la bellitereturo. Li verkis skizojn, novelojn kaj eseojn, kunlaboris en komunistaj kaj progresemaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Kompreneble, la reakciuloj ne toleris tion kaj ĵetis lin en malliberejon.

La soci-politika evoluo de nia lando kaj la akriĝanta klasbatalo igis lin dediĉi siajn fortojn al pli gravaj problemoj. Li fariĝis elstara batalanto sur la fronto de la filozofio. Lia granda merito en tiu sfero estas la imponaj verkoj „Teorio de la reflektado“ kaj „Ĝenerala teorio de la arto“. En tiuj ĉi du ĉefverkoj, unikaj en la scienca mondliteraturo, la aŭtoro sisteme prezentas la estetikon de la marksismo-leninismo.

Krome, Pavlov faris multon por la

metodologio en la scienca historio de nia lando, por la evoluo de nialanda sociologio, por la apliko de la marksismo-leninismo en la pedagogia teorio kaj praktiko.

Dum kelkaj jaroj li vivis en Sovetunio, kie li laboris kiel dekano de instituto de filozofio kaj literaturo. Li estis profesoro de dialektika materialismo en diversaj institutoj. Oni elektis lin membro de la Soveta Akademio de Sciencoj.

Sur la internacia kampo Todor Pavlov faris multon por la evoluo de la klasbatala laborista movado, por distavistigo de la ideoj de internaciismo. Per plumo kaj parolo li kontraŭbatalis diversajn tendencojn de la burĝa ideologio. Ankaŭ la dekstrajn kaj „maldekstrajn“ adeptojn de oportunismo li ne indulgis, senmaskigis ilin senkomplete.

Verve li polemikis kun diversaj eksterlandaj antikomunistoj kaj kontraŭuloj de Sovetunio, per nerifuteblaj argumentoj defendis la unuan en la mondo ŝtaton de laboristoj kaj kamparanoj.

Todor Pavlov ne estas nur kabineta sciencisto kaj verkisto. Li ligis sian teoriaran laboron kun la praktiko, kun la praktika batalo. En 1927 li partoprenis la fondon de la Laborista Partio, kiu anstataŭis la eksterlegigitan Komunistan Partion fare de la faŝistoj.

Post la kontraŭfaŝista ribelo en septembro 1944, kiam nia lando ekspiris libere dank'al la Ruĝa Armeo kaj la Bulgara Naciliberiga Armeo, Todor Pavlov estiĝis unu el la tri regentoj de Bulgario. Post la referendumo, kiam nia popolo balotis por respubliko, li denove dediĉis sin al scienca laboro, ekgvidis la Bulgaran Akademion de Sciencoj.

Nun, malgraŭ siaj 85 jaroj, Todor Pavlov daŭre laboras kiel membro de CK de la Bulgara Komunista Partio

kaj de ĝia Politika Buroo, kiel honora prezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, direktoro de ĝia filozofia instituto ktp.

La ĝenerala sekretario de la Bulgara Komunista Partio kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario Todor Ĵivkov jene taksas lin: „Dimităr Blagoev, Georgi Bakalov kaj Todor Pavlov estas gigantoj sur la

kampo de la kulturo, fieraĵo por nia progresema intelektularo kaj laborista klaso, por nia bulgara popolo kaj la Komunista Partio“.

La bulgaraj esperantistoj sincere deziras al kamarado Todor Pavlov bonfarton kaj vivenergion por novaj sukcesoj en lia scienca laboro kaj en la batalo por venko de la komunismo!

REMEMORO PRI TODOR PAVLOV

Oktobro 1923 jaro. Ni, kelkaj lernantoj (17-jaraj), faris nian kutiman unuhoran promenadon tra la korto de la Centra Malliberejo. Mi elpoŝigis malgrandajn kartonetojn, sur kiuj unuflanke estis skribitaj Esperantaj vortoj kaj aliflanke la bulgara traduko. Post trarigardo la kartonetoj estis metataj en la alian poŝon.

— Knaboj, kion vi faras? — diris alproksimiĝanta viro.

— Ni lernas la Internacian Lingvon, — respondis ni.

— Ĉu vi havas ian lernolibron kaj ĉu vi povus doni ĝin al mi? — denove demandis la viro.

Ni donis al li la lernolibron de ADA, kiun

oni nelegale enportis en la malliberejon. Ĝuste post unu semajno la sama homo venis al nia ĉelo, legis kaj tradukis libere la Esperantan tekston, erarante nur kelkloke la akcenton.

Tiu homo estis k-do Todor Pavlov, nun akademiano, prezidanto de la Bulgara Akademio de Sciencoj, kiun mi kiel redaktoro de ĵurnalo „Mladeŝ“ (Junulo), organo de Junulara Komunista Asocio, konis nur laŭnome. Nun dank'al Esperanto ni interkonatiĝis persone.

Depost tiam ni ofte renkontiĝis. K-do Todor Pavlov rakontadis al ni interesaĵojn kaj kuraĝigis nin.

M. Milev
(El „Bulteno“ — organo de BEA kaj BEK, 7/1956)

1975 — Internacia Jaro de la Virino

LA VIRINOJ EN LA BULGARA ESPERANTO-MOVADO

Pri partopreno de esperantistinoj en la frua periodo de la bulgara Esperanto-Movado — ĝis 1908, ni ne havas informojn. Eble ni malkovrus nomon de iu bulgarino en la eldonataj ĉiujare de Zamenhof en tiu periodo Adresaroj, sed tio estas tre dubinda. Aktivaj esperantistinoj aperas en 1908: prezidantino de la E-grupo en vilaĝo Kovaĉevac, reg. de Popovo, estis la instruistino *Cvetanka Ks. Jankova* kaj sekretario de la grupo estis ŝia edzo Ksenofon Jankov, ankoraŭ nun vivanta veterano, proksimiĝanta al 90-jara aĝo). En la sama 1908 Esperanton ellernis, paralele kun mi, mia fratino *Donka Atanasova* (post edziniĝo Abaĝieva); ŝi ekhavis viglan korespondadon kun

gesamideanoj el Hungario, Anglio, Hispanio kaj Ĉeĥoslovakio. En la sekva 1909 dum la Unua Kongreso de la rumanaj esperantistoj, kiun vizitis gaste 120 bulgaraj samideanoj, en teatra prezentado de la sceneto „Unu horo de Esperanto“ (de Th. Cart) rolis ankaŭ la bulgarino *Jordanka Djugmeĝieva* (post edziniĝo Silvestrieva) el Sumen. En la sama jaro en Sofio ellernis Esperanton *Ivanka Rajnova*, fratino de la konata verkisto Nikolaj Rajnov (post edziniĝo Daskalova). Donka kaj Ivanka fariĝis intimaj amikinoj, plej akurataj partoprenantinoj de la regulaj semajnaj kunvenoj de la sofiaj esperantistoj; ili donis fervore sian helpon en ĉiuj iniciatoj de la societo, pleje per kud-



rado de flagoj kaj ornamado de salonoj por solenaĵoj. Iv. Rajnova tradukis en Esperanton preferatajn de ŝi versaĵojn en prozo de la pola poeto K. Tetmajer.

Post la jaroj de la Unua Mondmilito, kiam la enlanda Movado vekigis kaj ekmarŝis kun progresanta vigleco, la nombro de la esperantistinoj rapide kreskis. Preter la malnovaj Ivanka kaj Donka post ĉiu kurso en niajn rondojn venis novaj fortoj. Ekde 1920 en Sofio inter la aliaj gesamideanoj tre sindone eklaboris *Elena Toĉeva*, oficistino. En tiuj jaroj ni ne povis revii pri propra kancelaria ejo (la „kancelario“ de la Asocio estis en la hejmo kaj parte „en la poŝoj“ de la sekretario), nek revii pri pagataj oficoj; ni ne havis, nature, ankaŭ skribmaŝinon. Elena Toĉeva venis helpe kaj kontribuis konsiderinde por la regula „kancelaria“ funkciado de la organizaĵo: ĉiutage ŝi dediĉis unu horon aŭ pli super sia ofica labor-tempo por tajpi korespondaĵojn, raportojn kaj manuskriptojn; por la celo ĉiumatene ŝi venis al mi unu horon antaŭ la labortempo, prenis materialojn kaj la sekvan matenon alportis ilin tajpitaĵoj kaj prenis novan porcion. Ŝi estis unu ero el tiu anonima heroo armeo de agantoj, kies nomoj ne brilas en la Esperantaj gazetoj, kiuj ne estas laŭdataj kaj celebrataj, restas ĉiam en ombro, nevidataj, sed al kies sindona ofera laborado — la „nigra laborado“ en la Movado — ni ŝuldas la normalan marŝon kaj progreson de Esperanto, ĝiajn sukcesojn. Bedaŭrinde Toĉeva ne vivis longe, ŝi forpasis en sia floranta juneco.

En 1925 en la Movadon enfluis nova forto: *Lidija Ŝiŝmanova*, edzino de la eminenta bulgara sciencisto, profesoro de literaturo en la Sofia Universitato Ivan D. Ŝiŝmanov, ŝi mem aŭtorino de recenzoj pri koncertaj kaj aliaj eventoj en la muzika vivo. Ŝi, fakte, esprimis deziron lerni Esperanton jam en 1911. Iun tagon, kiam mi vizitis la profesoron en lia hejmo, ŝi

eniris la kabineton. D-ro Ŝiŝmanov prezentis min per la vortoj „S-ro Atanasov, esperantisto“ kaj ŝi verve ekparolis: „Ah, Esperanto! Mi deziras lerni ĝin. En Ĝenevo s-ro Evstifejev ne sukcesis instrui ĝin al mi, sed nun . . .“ La edzo diris: „Nu, jen s-ro Atanasov kondukos vin al iliaj kunvenoj, kaj tie vi lernos.“ Tamen ŝi tiam ne trovis tempon por realigi sian deziron. En 1918, post la fino de la milito, la geedzoj troviĝis en Ukrainio; de tie ili forveturis al Germanio, en la urbon Freiburg, kie d-ro Ŝiŝmanov komencis lekciis en la Universitato. En tiu urbo ili eniris medion de esperantistoj, kaj Lidija fine realigis sian revon: ellernis Esperanton. Ŝi skribis al mi, sendis artikolon „Kiel kaj kial mi fariĝis esperantistino“ (vidu Bulg. Esperantisto, 6/1923, p. 84). En 1925 ili revenis Bulgarion kaj tuj starigis rilatojn kun la sofiaj esperantistoj. (En la sama jaro la profesoro malfermis kaj prezidis la unuan publikan kunvenon de la kutima en tiuj tempoj „Verda Propaganda Semajno“). Lidija Ŝiŝmanova ekagis flame kaj senlace por Esperanto, precipe en intelektulaj rondoj. Ŝi vizitis Univesalajn Kongresojn kaj konatiĝis persone kun Edmond Privat kaj aliaj elstaruloj de la monda E-Movado.

Vice kun Lidija Ŝiŝmanova en Sofio distingiĝis kiel sindona kaj tre aktiva esperantistino *Smaragda Noĵarova*, dentkuracistino; preter ŝi ankaŭ *Berta Marinova* (flandrino, edziniĝinta je bulgaro) kaj *Ana Viĉeva*.

Smaragda Noĵarova — inteligenta, modesta, neparadema, sincere amata kaj ŝatata de ĉiuj sofiaj esperantistoj, partoprenis arde en ĉiuj multflankaj iniciatoj. Post ŝia morto, en 1933, ni eksentis denove ŝin kaj ŝian sindediĉon al la afero: en sia testamento ŝi enskribis 100 000 levojn por aĉeto de propra domo de la sofiaj esperantistoj. Per tiu ĉi heredaĵo, alkolektinte inter ni ankoraŭ 20 000 lv., en 1935 ni aĉetis

triĉambran apartamenton en la ĉentro de la ĉefurbo. El du ĉambroj, foriginte la internan muron, ni formis salonon por kunvenoj kaj kursoj, la trian ĉambron ni disponigis por kancelario al la Bulgara Esperantista Asocio. Ekpulis vigla Esperanta vivo en tiu ĉi propra nesto, kiun ornamis marmora busto de la testamentino (farita kaj donacita de ŝia frato-skulptisto) kaj marmora tabulo kun orlitera skribo pri ŝia nobla faro.

Alta oferemo karakterizas ankaŭ la du amikinojn Berta Marinova kaj Ana Viĉeva; por helpi realigon de gravaj iniciatoj ili malavare malfermis siajn monujojn kaj donacis konsiderindajn sumojn (po 1000 levoj—ne nur unufoje).

Ne estas facile elnombri ĉiujn nomojn de virinoj, kiuj en tiu ĉi periodo de 22 jaroj laboris sindone kaj modele por la prospero de Esperanto en la urboj kaj vilaĝoj de nia lando: Zora Mladenova Hans, Elisaveta Begajeva, Mara Krušovska, Irina Ĉukova, Nadja Borimeĉkova, Mara Sাবেva, Radka Atanasova (Bjala Slatina), Radka Atanasova — Rajnova (Sofio), Tinka Lakova, Trajana Petkova, Bogdana Popova . . . mi citas tiujn ĉi nomojn kun la konvinko, ke multajn kaj multajn aliajn, ne malpli meritajn, mi preterlasas pro nepovo.

Post la finiĝo de la Dua Mondmilito ekestis la nuna — jam transpasinta 30 jarojn — periodo. Preter la restintaj aktivulinoj de la antaŭa periodo elkreskis nova generacio de esperantistinoj. Ĉirkaŭ 1955 en la hejmo de Donka Atanasova—Ābaĝieva komenciĝis regulaj kunvenoj de virina parolanta rondo, kiu poste estis la kerno de la Virina Sekcio de BEA. La nombro de la bulgaraj esperantistinoj, feliĉe, estas jam granda kaj mi ne kuraĝas doni la tre longan liston de ĉiuj meritaj nunaj aktivulinoj. Tamen mi ne povas rezisti la tenton citi almenaŭ tri nomojn.

Belka Beleva, kiu per sia artistina talento verŝis novan fluon en la esperantistan vivon. Ja ĉiuj konas bone

ŝin kaj ŝian valoron por la Movado. Ĉiam preta doni sian kontribuon, ŝi plene meritas la entuziasmajn aplaŭdojn, per kiuj oni renkontas ŝin sur la podio. Ŝi sincere amas Esperanton, kiu regas en ŝia hejmo. Ne nur ŝia edzo Anani Anev, egale valora kaj sindone kontribuanta artisto, sed ankaŭ ilia fileto estas nia fervora samideano el la plej nova generacio. Kiel E-artistino Beleva famigis nian popolon kaj ĝian kulturon eksterlande.

Parolante pri la meritoj de B. Beleva, ni ne povas prisilenti ankaŭ la valoran kontribuon de alia artistino kaj samideanino — *Maria Angelova*, kiu same digne prezentas la bulgarajn esperantistinojn per sia kanta talento, kiel en nia lando, tiel ankaŭ sur alilandaj scenejoj, speciale en niaj Universalaj Kongresoj.

La tria nomo estas *Rajna Konstantinova*. Ŝin mi povas kompari kun la neforgesinda heroino Elena Toĉeva de la antaŭa periodo. Krom literatura aktiveco — bonaj tradukoj, ŝi donas neimageble grandan helpon al la Movado per „nigra laboro“, nevidata kaj neaprezata: akurata tajpado de multaj materialoj, kiun laboregon ŝi faras senpage, senprofite en eksterlaboraj horoj en la banko, kie ŝi oficas, kaj parte en sia hejmo — ĉi tie en tre malfavoraj laborkondiĉoj. Tio estu instrua ekzemplo por tiuj samideanoj, kiujn oni devas inviti plur- kaj plurfoje al pago de la tre modesta kotizo al la E-societo!

Jes, tre grava estas la rolo de la virinoj kaj la signifo de ilia kontribuo al la bulgara Esperanto-movado. Kaj tiu ĉi rolo senĉese pligrandiĝas, paralele al la plimultiĝo de la batalantinoj. Eniru en la kunvenon de la sofiaj esperantistoj: ofte vi vidas, ke la nombro de la virinoj egalas, foje eĉ superas tiun de la viroj. Saman bildon vi povas vidi, ekzemple, en kunvenoj de la Sofia Literatura Esperantista Rondo, de la Sofia Instruista Societo ktp.

(Sekvas sur p. 20)



pri la 7-a konsultiĝo de reprezentantoj de Esperanto-asocioj kaj movadoj en socialistaj landoj

En la tagoj de la 29-a de marto ĝis la 1-a de aprilo 1975 okazis en Melnik (apud Praha—Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko) la 7-a Konsultiĝo de reprezentantoj de Esperanto-asocioj kaj movadoj el Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

La Konsultiĝo traktis la formojn kaj metodojn de plua kunlaborado de la reprezentitaj organizaĵoj por plibonigo de l'stato de la esperantista agado en la koncernaj landoj kaj en la internacia Esperanto-movado.

La Konsultiĝo aparte okupiĝis pri la koncernaj Esperanto-organizaĵoj lige kun la proksimiĝanta 30-jara jubileo de la venko super la faŝismo en la Dua Mondmilito.

Ankaŭ la Internacia Jaro de la Virino estis diskutita por esplori plej taŭgajn formojn de partopreno fare de la respektivaj Esperanto-organizaĵoj en tiu tutmonda aranĝo.

En la diskutoj pri la neceso de sciencaj esploroj el marksisma vidpunkto de la problemoj de internacia lingvo kaj pli speciale de Esperanto la partoprenintoj notis kun granda kontento la fondiĝon de Problema Grupo pri la demando de internacia helplingvo ĉe la Instituto por Lingvistiko de la Soveta Sciencakademio.

La Konsultiĝo turnas sin al la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj kun propono fari la necesajn paŝojn por organizo de la 9-a Konsultiĝo en Moskvo, lige kun la 60-jara jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (1917—1977).

La loko kaj dato de la 8-a Konsultiĝo estos definitive fiksitaj post esploro de iuj teknikaj cirkonstancoj.

Melnik (Praha), la 1-an de aprilo 1975

DE LA KONSULTIĜO

ORGANIZA VIVO

VIGLA ESPERANTO-AGADO EN PRESLAV

Ĝus pasis la jubilea celebrazo de la 100-jariĝo de popola legejo „Razvitije“ en urbo Preslav kaj komenciĝis du kursoj de Esperanto. Tion oni atingis per multa propoganda kaj klariga laboro de la fondita en majo 1974 E-Societo „Ivan Kândev“ ĉe la uzino por aŭtoremorkoj en la urbo. Por tiu celo la sekretario de la Societo k-dino Rajna Stanĉeva faris multajn prelegojn en lernejoj, oficejoj kaj pere de la urba radio-reto. Estis aranĝitaj E-anguloj, ekspozicioj de E-eldonaĵoj, oni projekciis E-filmojn pri la aŭtomobiluzinoj „Fiat“ (Italio).

La aŭtunon solene estis malfermita la Esperanta lernoĵaro. K dino Stanĉeva, ĵus reveninta de la 45-a kongreso de la italaj esperantistoj en Verona, rakontis interese pri ĝia laboro kaj pri la belega suna lando. Ŝiaj paroloj vekis grandan intereson al la Internacia lingvo. Pa-

sis nelonga tempo kaj oni invitis ŝin prelegi ankaŭ en la elementa lernejo „Kiril i Metodi“.

Ĉi tie ekfunkciis nova E-kurso por 41 lernantoj. La infanoj fariĝis la plej bonaj propagandantoj de Esperanto en la urbo. Ofte oni povas vidi ilin marŝantaj en grupetoj sur la ĉefstrato kaj kantantaj E-kantojn, ĉirkaŭinte kiel birdidoj sian E-instruistinon R. Stanĉeva. Ili akompanas ŝin ĝis la aŭtobushaltejo kun bondeziroj „Bonan nokton!“ kaj „Ĝis revido!“

Mi rigardas mire kaj envie tiun ĉi jam ne junan virinon: ŝi atingis la kvindekan aragon, sed la okhora laboro en la uzino ne pezas al ŝi. . . Post la labortago — 2 horojn kun tiuj bruantaj petoluloj! Sed ŝi ridetas feliĉe al mi kaj diras: „Ege bedaŭrinde, ke mi ne dediĉis min al la instruista profesio! Tiel mi

estas feliĉa nun inter miaj lernantoj-esperantistoj !"

Ŝi rakontis pri sia konatiĝo kun instruistoj-esperantistoj el u. Ĉezena, Italio, kiuj ekdezi-
ris korespondi kun bulgara lernejo, kie estas
instruata Esperanto. Stanĉeva tralegis al siaj
lernantoj la unuan leteron el eksterlando. Ĝi
estis el u. Ĉezena. Ĝin akompanis 13 koloraj
bildkartoĵoj. Per ŝia helpo la nelertaj infanaj
manetoj skribis siajn unuajn E-leterojn, elek-
tis kaj sendis la unuajn bildkartoĵojn, kiuj sen-
vorte rakontas pri la plej belaj bulgaraj urboj,
pri nia libera socialisma patrolando.

En decembro la esperantistoj de Societo
„Ivan Kânev“ organizis urban kunvenon lige
kun la 31-a jaro post la pereco de ilia patrono,
sindona kontraŭfaŝisto kaj esperantisto, kruele
mortigita de la faŝistoj, kaj okaze de la 115-a
naskiĝtago de Zamenhof. Riĉan belartan pro-
gramon en Esperanto kaj en bulgara lingvo
prezentis la lernantoj de Rajna Stanĉeva. La
civitanoj ege miris, ke nur post unumonata
lernado la infanoj povis deklami kaj kanti tiel
bone en Esperanto. Tiu fakto ludis gravan ro-
lon por la plua propagando de Esperanto.

En la urba hospitalo de Preslav k-dino Stan-
ĉeva invitis de la vicĉefkuracisto d-ro Popov,
faris prelegon je temo „Esperanto serve al la
scienco kaj la progreso“. Ŝi rakontis ankaŭ
pri sia vojaĝo al Italio, projekciis diapozitivajn
filmojn pri Romo kaj Venecio.

Samtempe en la hospitalo estis aranĝita an-
gulo de E-literaturo. Rezulto: jam la sekvan
tagon d-ro Popov alportis skribpetojn de 20
medicinistoj, kiuj ekdeziris lerni Esperanton.
Kaj vere, ili fariĝis la bazo de nova E-kurso,
kiu tuj ekfunkciis ĉe la novefondita E-societo
„Ora Sieklo“, Dufoje en la semajno tiuj scia-
maj homoj kolektiĝas post la labortago kaj
lernas fervore Esperanton — la lingvon de
paco kaj progreso. Inter ili estas ankaŭ d-ro
Popov, d-ro Rumjana Nikolĉeva kun sia edzo,
flegistinoj kaj aliaj junaj laboremaj homoj.

En januaro estis vizititaj ĉiuj lernejoj. Oni
agitis la instruistojn partopreni la 20-tagajn
somerajn internaciajn E-kursojn por instruistoj
en Burgas. Post nelonge estis organizita nova
kurso — nur por instruistoj. Ĝia bazo fariĝis
la instruistoj el lernejo „Kiril i Metodij“.

Ĉio ĉi estas atingita per multa laboro kaj
per la valora morala kaj materiala helpo de la
prezidanto de l'Urba Popola Soveto k-do Va-
sil Stanev, de la agantoj de legejo „Razvitije“,
de la urbaj komitatoj de Bulgara Komu-
nista Partio kaj Patrolanda Fronto k. a.
Tio parolas, ke la gvidantoj de la urbo frunte
kun la unua sekretario de UK de BKP k-do
Vârban Veĉev jam pozitive pritaksas la inter-
nacion lingvon Esperanto kiel fenestron al
la mondo, kiel lingvon de demokratio, paco
kaj amikeco inter ĉiuj popoloj.

Marija Stojanova

„VARE — 75“

La 1-an de februaro en urbo Kubrat okazis
Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista (VARE-
75). Ĝin organizis la E-klubo en la urboj
Kubrat, Ruse, Razgrad kaj Isperiĥ. Partopre-
nis 40 esperantistoj.

Post komuna foto la partoprenantoj gastis
en kafejo „Espresso“, kie junaj esperantistinoj
el E-Societo „Progreso“ prezentis al ĉiuj ka-
fon apud tabloj ornamitaj per E-flagetoj.

En salono de la urba kulturdomo okazis
kunveno. Ĝin malfermis Anton Antonov, kiu
bonvenigis la esperantistojn el la aliaj lokoj.
Koncize pri la E-agado en Kubrat raportis
Ĥristo Dimitrov — la prezidanto de „Progre-
so“. Pri la agado de siaj E-kluboĵoj rakontis
esperantistoj el Ruse, Razgrad, Isperiĥ, Gorna-
Orjaĥovica kaj v. Ĉerkovna. Sekvis gaja kun-
estado kun ŝercoj, anekdotoj, deklamoj ktp.
Oni unuanime decidis, ke VARE fariĝu tradi-
cia, ĉiam la lastajn sabaton kaj dimanĉon de
januaro sub la aŭspicio de la Urba Pacdefenda
Komitato. Estis elektita konstanta VARE-ko-
mitato, kiu invitos ankaŭ eksterlandajn gas-
tojn.

La saman vesperon okazis komuna manĝo en
la popolstila restoracio „Meĥanata“ en la urba
parko.

La dimanĉan matenon, kun VARE-emblemo
surbruste kaj E-kantoj, ĉiuj direktiĝis al la
proksima arbaro, kie oni agrable pasigis la
tempon kaj tagmanĝis en la arbardomo.

*

La 7-an de februaro en la urba hospi-
talo de Kubrat ekfunkciis E-kurso por komen-
cantoj. Ĝin organizis la sindikata komitato kaj
la administracio. Partoprenas 30 personoj, inter
kiuj ankaŭ la ĉefkuracisto d-ro Krasnaliev, ini-
ciatinto de la kurso mem.

La kurson gvidas Ĥristo Dimitrov — inst-
ruisto en la loka gimnazio. Al li pagas la
administracio de la hospitalo.

Anton Antonov

(El paĝo 18)

Tio estas feliĉo por la Movado. Inter
la verdaj branĉoj en la bukedo, kiaj
estas la viroj, ĉiam pli abunde enmik-
siĝas belaj floroj de diversa koloro
kaj la bukedo akiras senĉese pli ĉar-
man aspekton. Tiun ĉarmon enportas
la virinoj.

A. D. ATANASOV



Komence de februaro la membroj de E-Societo „Aŭroro“ en u. Septemvri havis kunvenon kune kun la anoj de la E-kurso, gvidata de Dimitar Titerjakov. Oni unuanime akceptis promesojn lige kun la antaŭstaranta XI kongreso de BKP, nome:

1. Ĉiuj membroj, kiuj ĝis nun ne abonis la asocian organon, tuj faros tion. Abonos la gazeton ankaŭ ĉiuj kursanoj.

2. Ĝis la fino de marto la membrokotizo estos 100% kolektita.

3. Ĉiu membro kaj kursano komencos regulan korespondadon kun eksterlando.

4. Oni forestu de kunvenoj, kunsidoj aŭ lecionoj nur ĉe tre gravaj kaŭzoj.

La promesoj en punktoj 3 kaj 4 estas donitaj ankaŭ de la lernantoj en la E-klaso de s-ano Titerjakov en lernejo „Ĥristo Smirnen-ski“.

DMIDTIT

AKTIVA E-SOCIETO

E-Societo „Paco“ en u. Bjala ĉiujare aranĝas multajn E-kursojn. Ĉi-jare ĝi organizis 6 kursojn en la entreprenoj „Komunumaj Servoj“ kaj „Disvastigo kaj Ekspedo de la Presaĵoj“ (REP), en la loka presejo, en la gimnazio (tiujn kvar gvidas la E-veterano Simeon Baltaĝiev), en la fundamenta lernejo (gvidata de la instruisto Ĥristo Kalĉev) kaj urba kurso (sub la gvido de Enju Tiĉev).

El 80 regulaj membroj ni sukcesis abonigi 71 al „Bulgara Esperantisto“.

Sepan fojon ni eldonis nian jam tradician E-poŝkalendareton por 1975—40-paĝa, kun 12 vidaĵoj el la urbo. Por la sekvanta ni antaŭvidas eldoni 32-paĝan albumon-adresaron (kun la fotoj de geesperantistoj de Bjala kaj ĝia ĉirkaŭaĵo).

Ivan Severnjaŝki

E-KURSOJ EN PAVEL-BANJA

E-Societo „Supreniro“ en v. Pavel-Banja, distrikto de Stara Zagora, organizis E-kurson por komencantoj sub la gvido de Ĥristo Rastev. Je dispono de la kursanoj estas bela moderna salono en la Kulturdomo. La gekursanoj — 25 personoj — estas kuracistoj, ilegistinoj, oficistoj k. a.

La kurson malfermis k-do Rajno Ĉepilev — prezidanto de DK de Bulgara E-Asocio en Stara Zagora. Fine de la kurso oni aranĝos letervesperon kaj E-ekspozicion. Ĉiuj kursanoj jam dum la daŭro de la kurso fariĝos membroj de „Supreniro“.

Keti Ilieva

La 2-an de marto la Distrikta Komitato de BEA en Smoljan havis plenkunsidon. Oni pridiskutis la diversflankan E-agadon dum la jubilea 1974. En la raporto de la prezidanto Jordan Jordanov estis substrekite, ke la esperantistoj el la Mezaj Rodopoj inde renkontis la 30-an jubileon de nia socialisma revolucio. Trioble kreskis la nombro de la partoprenantoj en la internaciaj E-aranĝoj en Pisanica kaj Pamporovo, funkciis 25 elementaj E-kursoj kaj 4 por lingva perfektigo. Ĉiuj esperantistoj en la distrikto abonis la asocian organon „Bulgara Esperantisto“ kaj la organon de MEM „Paco“.

La plenkunsido pridiskutis ankaŭ la financon staton de la organizaĵo kaj programon pri kolektivaj vojaĝoj al eksterlando en 1975.

La diskuto partoprenis 13 gesamideanoj. En sia eldiro la reprezentantino de CK de BEA Fani Miĥajlova esprimis la kontenton de la Estraro de CK de BEA pri la vigla kaj varia agado de la distrikta esperantista Smoljan-organizaĵo, kiu donas imitindan ekzemplon por la E-organizaĵoj en la tuta lando. Ŝi alvokis la ĉeestantojn al ankoraŭ pli fervora agado por inda renkonto de la XI-a Kongreso de la Bulgara Komunista Partio

M. Diĉeva

Okaze de la 8-a de marto — la Internacia Tago de la Virino — membroj de la estraro de E-Sekcio „Justeco“ ĉe la Asocio de Juristoj en Bulgario frunte kun la prezidanto de la sekcio Genĉo Genĉev salutis sincere la ministrinon de l'justeco, s-rinon Svetla Daskalova.

Krom florbukedo, la estraranoj donacis al ŝia ministra moŝto luksan ekzempleron de la plej fama verko de Dante Aligieri „La dia komedio“ en E-traduko. Ili varme bondeziris, ke la ministrino en ne malproksima estonteco legu tiun verkon en Esperanto.



SIA — KUNE KUN LA KOMSOMOLO

La junulara sekcio de DK de BEA en Smoljan aranĝis vesperon omaĝe al la Semajno de Internacia Amikeco kune kun la Urba Komitato de Komsomolo.¹ Ĝi okazis en restoracio „Bulgario“. Ĉeestis multaj esperantistoj kaj neesperantistoj el la urbo kaj la distrikto. Karaj gastoj estis: Fani Miĥajlova — reprezentantino de CK de BEA, kaj la eksterlandaj gejunuloj Katrina Granĉos — Rumanio, Abdul Ahmed — Sudan, Zdenek Sokiš — Ĉeĥoslovakio k. a.

La sekretario de DK de BEA Stefan Pavlov varme salutis la ĉeestantojn kaj substrekiis la rolon de Esperanto por interproksimiĝo de la junularo el diversaj landoj kaj popoloj.

En sia salutparolado Anton Kavalĝiev — sekretario de DK de Komsomolo, substrekiis la utilan komunan laboron de Komsomolo kun la junulara E-sekcio, per kiu oni kontribuas por la patriotisma kaj internaciisma edukado de la junularo.

La eksterlandaj gejunuloj rakontis pri moroj kaj kutimoj de siaj popoloj, esprimis siajn impresojn pri nia lando.

Apartan intereson vekis la muzika konkurso en diversaj lingvoj. Al la plej bonaj plenumantoj oni donis premiojn.

Artistoj el la Dramteatro kaj esperantistoj amatoroj plenumis E-programon.

La Esperanta estrada orkestro „Orfeo“, direktata de Dimităr Rajĉev, grave kontribuis por la bona humoro. Oni dancis kaj ludis. Agrabla amika etoso regis la tutan vesperon.

Rodopanino

¹ Komsomolo — Unuiĝo de la Junaj Komunistoj.

**VESPERO DE LA E-VERKARO**

Enkadre de la Semajno de Internacia Amikeco ankaŭ ĉi-jare krom kelkaj kunvenoj en Sofio okazis la tradicia Vespero de la Esperanto-Verkaro. Ĝin organizis la Instruista E-Societo „Diĉo Petrov“, la Studenta S-to „Vela Peeva“ kaj la Esperanta Literatura Rondo de Sofio. En granda aŭditorio de la Sofia Universitato kunvenis pli ol 120 sofiaj esperantistoj.

En la programo estis originalaj kaj tradukitaj verkoj—poezio kaj prozo—de Asen Grigorov, Simeon M. Simeonov, Miĥail Ŝekerĝiev, Penka Batoeva, Miĥail Ĉobanov, Violin Oljanov, Ljuba Bojaĝieva, Simeon Ĉirpanliev, Nevena Nedelĉeva, Georgi Miĥalkov k. a. La aŭtoroj mem legis siajn verkojn; kelkaj estis plenumitaj de Vera Vâjarova, Sâbina Kovaĉeva, M. Strateva, K. Vâlev.

La vespero estis bona manifestiĝo de la krea povo de la esperantistoj.

Ĉeestinto**JUNULARA ESPERANTO-RENKONTIĜO EN PEȘTERA**

Je la 15—16 de februaro en Peștera okazis renkontiĝo de mezlernejaj junuloj el E-Societo „G. Dimitrov“ ĉe la Agrikultura Teknikumo en la urbo kaj la E-Societo „Fajrero“ en u. Dospat. Ili kune celebris la Semajnon de Internacia Amikeco.

En la unua tago la lernantoj havis varian programon. Post la vespermango la pli ol 50 partoprenantoj ludis, kantis, dancis, spektis filmon. La salono en la teknikumo estis bone ornamita per E-flagoj kaj la slogano „Amikeco trans limoj“.

La sekvan tagon la junuloj kun siaj E-instruistoj Ŝt. Kukuŝev, V. Penkova, E. Ĉirpanliev kaj V. Ĉirpanlieva vizitis la urban historian muzeon kaj ekskursis al la belega groto „Snejanka“.

Ŝterju Kukuŝev**ANDZEY KORNILUK**

el u. Bidgoszez, Pollando, gajnis la I-an premion en konkurso por la plej bela amatora kolora kinfilmo je temo „Esperantosomero 1974“. La filmo rakontas pri Rodopimontaro kaj la E-aranĝoj en Smoljan-distrikto.

Krom per la oficiala premio de la ĵurio, Korniluk estis premiita de la Distrikta E-Komitato de Smoljan per senpaga partopreno en la tieaj aranĝoj en 1975.

Gratulon al s-ano Korniluk!



TRA LA E★ MONDO

LA MOSKVA INTERNACIA...

En 1959, en la tago de la 100-a datreveno de la naskiĝo de L. Zamenhof — la kreinto de Esperanto, kiu tago laŭ decido de UNESKO estis celebrata en la tuta mondo, nin, la esperantistojn, oni invitis en la Centran Domon de la Medicinistoj. Tiu-ĉi tago — la 15-a de decembro — fariĝis naskiĝtago de la Moskva Internacia Esperanto-Klubo.

Mi rememoras la paroladon de la fondinto de la klubo — la kandidato de medicinaj sciencoj E. T. Salnikov. Malnova esperantisto — li jam en la 20-aj jaroj kunlaboris al la gazeto „Mejdunarodnij jazik“ (Internacia lingvo), — en la pasinteco kulturkleriga aganto en vilaĝa legejo de Smoljan-regiono, li parolis pri la ekskluzive granda kultura kaj praktika signifo de Esperanto. „Malfacilaĵojn ni ne devas timi, — li diris. — La klubo vivos per la aktiveco de siaj membroj.“

Jam en la unua kunsido oni decidis ne fermi sin en mallarĝa profesia medio. Membro de la klubo povas esti ĉiu esperantisto, sed la bazan laboron prenos sur sin la medicinistoj. Kaj en tiu ĉi unua tago parolis ne nur kuracistoj: raporton pri Zamenhof faris la lingvisto prof. E. A. Bokarev kaj pri-okazan paroladon faris elstara esperantisto — la ambasadoro de Demokratia Respubliko Vjetnamio Nguyen-van-Kinh. Ankaŭ la kerno de la klubo formiĝis el homoj kun diversaj profesioj: kuracistoj K. Lavrentjev kaj A. Pipkin, geografo kaj mondvojaĝanto

prof. D. Armand, biologo prof. S. Ĉahotin, verkisto J. Sergeev — ili ĉiuj regis la Internacian lingvon kiel gepatran.

La klubo ne vane estis nomita internacia. Jam en la unuaj tagoj de sia ekzisto ĝi kreis kontaktojn kun la esperantistoj el la frataj landoj. La aŭtoro de tiuj ĉi linioj jam en 1961 vizitis la kongreson de la esperantistoj en Pollando. Kaj la Universalan Kongreson en Sofio (1963) jam partoprenis kelkaj dekoj de niaj esperantistoj. Membroj de nia klubo vizitis la internaciajn E-forumojn en Budapeŝto, Vieno, Helsinki, Beogrado kaj Hamburgo.

Sed ni vojaĝas eĉ tiam, kiam nenien ni forveturas. La scenoj de nia klubbejo similas al ferdeko de sorĉa ŝipo: sur ĝi jam aperis esperantistoj el pli ol 60 landoj de la mondo. Tio ja estas komprenebla: nun ĉiuj vojoj kondukas al Moskvo, kaj ofte iuj homoj lernas Esperanton nur por povi sen tradukistoj kontakti kun sovetaĵ esperantistoj.

Mi memoras, kiel en nian klubejon venis du latinamerikaj komunistoj — Valter D. kaj Alvaro S. Malgrasaj, malfortiĝintaj, nedelonge estintaj en la malliberejoj de siaj landoj, kie ili lernis la Internacian lingvon. Ili rakontis pri la batalo de la latinamerikaj popoloj por libero. Poste la moskvaj esperantistoj instruis al ili la rusan lingvon kaj ili finstudis instituton.

Mi memoras ankaŭ la paroladon de la franco Victor Lebrun en 1968. „Dank al vi mi denove estas en la lando de mia majstro Leo Tolstoj“ — li diris, kaj en la salono eksplodis aplaŭdoj. Ĉar kiam oni diris al la literaturistoj, ke en suda Francio vivas la ekssekretario de L. N. Tolstoj, ili simple ne kredis: „Ne povas esti — ja tiom multe da jaroj forpasis ekde la morto de la verkisto.“

Sed ni sciis pri V. Lebrun, aktiva esperantisto, kaj jen ekfunkciis la telegrafo de la Internacia Lingvo. Mos-

kvanoj skribis al la diplomito de la Moskva Universitato Michel Duk de Goninaz, franco. Li invitis la hungaran esperantiston prof. E. Larkaš. Larkaš vizitis Lebrun kaj sendis leteron al USSR. Kaj jen — komisiite de la Ministerio de Kulturo de USSR Lebrun veturis al Moskvo por labori en la muzeo de Leo Tolstoj.

Ŝajnas, ke tio estas du malsamaj renkontoj. Sed en ili estas io esence komuna: la gastoj de nia klubo ordinare estas amikoj de nia lando kaj propagandantoj de la soveta kulturo. Michel Duk de Goninaz instruas rusan lingvon en Francio, Lebrun estas leŝinta lekciisto pri L. Tolstoj en la Sorbono, Valter D. rakontis en Brazilo pri la soveta popolo. Al la plimulto de ili Esperanto helpis lerni la rusan lingvon. Ne vane la prezidanto de la klubo E. T. Salnikov ŝatas ripeti: „La rusa kaj Esperanto estas amikoj!“

Esperanto estas unu el la pontoj, pere de kiuj niaj eksterlandaj amikoj konatiĝas kun la soveta kulturo. En la rondo de la E-tradukistoj ĉe MIEK naskiĝis multaj el la libroj, eldonitaj de SOD (Asocio de la Societoj por Amikeco kun Eksterlando) — paroladoj de gvidantoj de la Partio kaj Registaro, rakontoj de Gorkij, Ŝoloĥov, Gajdar, poeziaĵoj de Majakovskij, Esenin kaj Garcia Lorka, la sovetaĵ eldonoj de „Paco“.

Interŝanĝo de spertoj

EL LA PROGRAMO DE LA MOSKVA INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO por la 1-a duono de 1975

Vespero de la amikeco inter Sovetunio kaj Kubo (organizanto — la junulara sekcio de la klubo).

La ideologia laboro — fronta linio de la komunisma konstruado.

Skizoj pri la historio de la E-movado (akademiano P. Ariste, d-ro I. Ĉaĉe, la Leningrada organizaĵo).

Metodika seminario. Lernolibroj kaj instruiloj de Esperanto.

Internaciaj religi-organizaĵoj.

Laŭtema vespero. Esperanto en mia vivo. Parolas I. L. Baŝenov (el urbo Gorkij), G. P. Demidjuk, A. S. Nikitin, I. I. Palkin, S. N. Krajnov, E. T. Salnikov, V. F. Juskoviĉ kaj

Esperanto estas lingvo de la espero. Dum la pezaj jaroj de la batalo de l'vjetnama popolo por nacia sendependeco en tiu lingvo sonis la slogano de la sovetaĵ esperantistoj: „Helpu al demokratia Vjetnamio!“. Moskvanoj iniciatis kolektadon de rimedoj por siaj vjetnamaj fratoj, kaj ne nur unu sendaĵo kun medikamentoj forveturis al la frata lando. Kaj kun kia ĝojo ni legis la dankleteron, senditan de nia malnova amiko — la prezidanto de la Vjetnama Pacdefenda E-Asocio k-do Nguyen-van-Kinh! Kiel relikvo en la pakaĵon estis metitaj libroj en Esperanto, eldonitaj en la jaroj de la milito en suda kaj norda Vjetnamio.

...Nedelonge, post la regula Pacforumo en Moskvo (1973), la partoprenintaj en ĝi esperantistoj kunvenis, kiel kutime, en la Moskva Internacia E-Klubo. Ĉi tie estis reprezentantoj de Francio, Svedio, Jugoslavio, Bulgario kaj USSR. En la nomo de nia klubo salutis ilin la Esperanto-poeto K. M. Gusev — kunlaboranto de ĵ. „Pravda“. Respondis al li la prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio Nikola Aleksiev — membro de la Tutmonda Packonsilio.

Okazis ordinara kunveno, amika interparolado de samideanoj, kiuj en rekta kaj figura senco havis komunan lingvon.

A. ĤARKOVSKIJ
„El ĵ. „Sovetskaja Molodjoĵ“

aliaj veteranoj.

Literaturaj vesperoj. Novaj tradukoj en E-to. Tago de la Soveta Armeo kaj Militmara Floto.

Virinoj en la batalo por paco (okaze de la Internacia Virintago. Organizanto — la urba Domo de la Instruisto).

Esperanto en la mondo de artoj (lige kun la Internacia Tago de la Teatro).

Pro la sano de la homoj (lige kun la Internacia Tago de la Sano).

Novaj ideoj en la geografio (lige kun la 70-jariĝo de prof. D. L. Armand).

La Hungara Popola Respubliko (lige kun la



DEKLARACIO

DE LA JAPANA PACDEFENDA ESPERANTISTA ASOCIO

Ni, la anoj de la Japano Pacdefenda Esperantista Asocio, rigardas kiel gravan ofendon, se ne senspritan ŝercon al la pacamantaj popoloj de Japanio kaj de la aliaj partoj de la tuta mondo tion, ke la Komisiono de Nobel-Pacpremio decidis donaci tiun premion por 1974 al la eksa ĉefministro de Japanio Eisaku Sato.

Laŭ la Komisiono motivis la premiadon: 1) la kontribuo de Sato por stabileco en la pacifika regiono kaj 2) liaj klopodoj ne enportigi nuklearmilon en Japanion.

Tiu ĉi informo alvenis al ni tre sarkasme, ĝuste kiam la atesto de Adm. G. R. Larocque draste renversis la grundon lige kun la enportado de nuklearmiloj en Japanion. Lia atesto agnoskis, ke usonaj mararmejaj ŝipoj, kapablaj porti nukleajn armilojn, jam vizitadis japanajn havenojn sen anticipa malŝarĝo de la nukleaj armiloj.

En 1967, tuj post la komuna deklaro de Sato — Johnson (Ĝonson), Sato aŭdacis konsenti la enportadon de nukleaĵo, rekonante la enhavenigon de la nukleomotoro aviadil-portoŝipo „Enterprise“, kiu estas migranta nuklea bazo. Dume li insistis la nuligon de „nuklea alergio“ de la japana popolo pretekste de „paca utiligo de atomenergio.“

Kion efektivigis ĉefministro Sato ekde sia enoficiĝo antaŭ dek jaroj? Li preferis militon ol paco, enportadon

de nuklearmiloj ol ilia ekskludo. Li trompadis la popolon, jen laŭte mensogante, jen ŝirmante sin de la popolaj okuloj.

Estas historia fakto, ke Sato aktive koluziis kun prezidentoj Johnson kaj Nixon en ilia feroce agresmilito en Vjetnamio, permesante al ili laŭplaĉan uzon de militbazoj en Japanio kiel atak-eliraj kaj provizaj bazoj. Tio montras, ke li estis unu el la plej gravaj personoj, kiuj detruis la pacon en Azio.

Siatempe Usono alte taksis tion, dirante, ke sen la japana kunlaborado ne estus „vjetnama milito“. Kaj kiam Sato publikigis sian subtenon al la usona bombado en Norda Vjetnamio, oni nomis lin la unua persono, kiu „ruinigis la legendon, ke neniu granda nacio konfirmas usonan vjetnam-politikon“. (Washington Star, 11. XI. 1967).

Ni neniam forgesas, ke nia respektata samideano kaj amata kamarado Ĉunoŝin Jui mortis en flamo antaŭ la rezidejo de la tiama ĉefministro Sato, protestante kontraŭ lia kunlaboro kun la usona registaro en la vjetnama milito — nome, en „senfina eskalado de sendistinga bombado, uzado de novaj armiloj ne malpli kruelaj ol la atom-bombo, viktimitigo de senkulpaj infanoj kaj turmentado de la vjetnama popolo“ (el la testamento de Ĉunoŝin).

Japana Pacdefenda Esperantista Asocio

30-a datreveno de la liberigo de Hungario el la faŝismo).

Memore al V. I. Lenin. Ekskurso al la Muzeo de Lenin. Vespere: „La lumo de la Lenin-ideoj“.

Vespere dediĉita al la 30-jariĝo de la venko super la faŝismo — „Ni iris al batalo kaj venkis en la nomo de la vivo sur la tero!“

Apudmoskva regiono — historiaj lokoj kaj sanigaj faktoroj.

Novaj ŝtatoj sur la mondkarto.

Ekskurso al u. Klin. Vizito de la muzeo-domo de P. I. Ĉajkovskij kaj la tombejo de V. N. Seriŝeva.

Kresku por la paco (lige kun la Internacia

Tago por Defendo de la Infano).

Metodika seminario. Interŝanĝo de spertoj en la laboro de la E-organizaĵoj en Moskva-regiono.

Tribuno de la esperantisto. La soveta E-movado en socialisma aspekto.

La kunvenoj okazas en la Centra Domo de la Medicinistoj, adreso: 103 009 Moskvo, K-9, str. Ĝercena 19, CDKMR, Esperanto.

Vendrede: raporto, prelegoj, celebroy k. s.

Merkrede: renkontiĝoj, konversacioj, konsultiĝoj.

En la klubejo oni ĉiam povas trarigardi novajn E-eldonaĵojn, aŭskulti magnetofonbendojn, preni E-librojn el la biblioteko.



INTERLINGVISTIKA UTOPIISMO

de prof.d-ro STOJAN ĜUĜEV — membro de la Akademio de Esperanto

Multaj personoj — eĉ interlingvistoj — konsideras Esperanton kiel lingvistikan utopion kaj la esperantistojn — kiel nekorekteblajn utopiistojn. Ekzemple, la soveta sociologo-interlingvisto Ermar Pavloviĉ Svadost-Istomin skribis en sia antaŭ nelonge aperinta libro: „La aŭtoro de la Esperanto-utopio kredis, ke se oni sufiĉe propagandas Esperanton, ĝi disvastiĝos inter ĉiuj popoloj“¹. Kaj iom pli supre li nomas Zamenhof „obstina revanto“. Por la momento ni ne bezonas insisti pri la evidenta kontraŭdiro en la aserto de la oponento: unuflanke li nomas Esperanton „utopio“ kaj Zamenhof — obstina revanto; sed aliflanke li mem en la sama verko kritikas la „senbazan antaŭjuĝon kontraŭ la artefarita lingvo“ (paĝoj 212—235) kaj agnoskas, ke „pro la liĉa kunagado de la cirkonstancoj“, el ĉiuj — pli ol 300 — individuaj projektoj de internacia helplingvo, „nur unu — Esperanto — sukcesis akiri certan disvastiĝon kaj uzadon en la tuta mondo“ (p. 123); kaj ke la tutpotenca propagando por Interlingua fare de IALA — la plej granda lingvistika entrepreno de la XX jarcento, posedanta miliarddolaran fonduson — „ne sukcesis en tiu konkurenca batalo forpuŝi la Zamenhofan lingvon, kiu jam kreskigis vastan internacian movadon“ (p. 120).

Ĉu efektive povas esti nomata utopiaĵo aŭ ĥimero tiu rezistpova kaj vivkapabla lingvo, kiu eltenis la konkurencojn de pluraj centoj de lingvo-projektoj (el kiuj multaj subtenataj de mondkonataj sciencistoj, aŭtoritatuloj

kaj potencaj financaj organizacioj) kaj kiu, laŭ la oponento mem, sukcesis krei vastan internacian movadon kun multaj dekmiloj da fervoraj adeptoj resp. uzantoj kaj multaj centmiloj da simpatiantoj? — Sed fakte ne tio ĉi estas la esenco de la diskuto.

Oponento plue al sia kolego prof. E. A. Bokarev kaj al siaj aliaj kolegoj el la Sekcio por Interlingvistiko de la Departamento por Lingvo kaj Literaturo ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR, Svadost korekte formulas la problemon de la diskutoj, tamen erare solvas ĝin: „Dum la diskutado okazinta en tiu ĉi sekcio kelkaj esperantistoj starigis la tezon: estas necese unue atingi la tutmondan disvastiĝon, la ĝeneralan lernadon kaj uzadon de Esperanto kaj jam iam poste, kiam ĝi fariĝos vivanta internacia lingvo, estos eble plenigi ĝiajn mankojn, pliperfektigi ĝin. Simila ideo, daŭrigas Svadost, trovis lokon en la esperantista gazetaro de Sovetunio ankoraŭ dum la tria jardeko (de la XX jc.). Ni neniel povas konsenti kun ĝi: la projekton de internacia lingvo oni devas unue maksimume perfektigi kaj nur poste disvastigi — sed ne inverse. Ju pli disvastigita kaj uzata estas unu lingvo, ju pli multe da literaturo ĉiuspeca ekzistas kaj aperas en ĝi. . . , ju pli fortaj estas ĝiaj tradicioj — des pli ĝi fariĝas stabila, des pli malfacile estas enkonduki en ĝin iajn ajn novaĵojn, kaj precipe iajn ajn ŝanĝojn — substitui iujn vortojn kaj morfemojn al aliaj.“

Tio ĉi estas la kerno de la problemo, kaj Ermar Svadost havas la meriton klare ĝin formuli. Sed ĉu li korekte solvas ĝin? — Certe ne! Unue, pri la eblecoj de perfektigo. Ermar Pavloviĉ

¹ Э. Сवादост. Как возникнет всеобщий язык? Москва, 1968 стр. 125 (E. Svadost. Kiel ekestos la ĝenerala lingvo? Moskvo, 1968, p. 125).



tute ne bezonas timi, ke la fiksiĝo, la stabiliĝo de la internacia lingvo sekve de ĝia rapida dtsvolviĝo tra la vastaj popoltavoloj bremsos aŭ tute malhelpos ĝian evoluon kaj perfektigon. Male! Ĝia disvastiĝo plirapidigos ĝian evoluon, venigonte multe pli grandan nombron da pensantaj kaj kreantaj cerboj en la sinon de ĝia socia organismo, de ĝia parolanta kaj vivanta popolo, kiuj amase kontribuos al la senĉesa perfektigo de la lingvo. Tamen — kaj tio ĉi estas ankoraŭ pli grava — ĝia disvastiĝo kaj amasa uzado efektive bremsos la hazardan, unuflankan, arbitran kaj senkontrolan intervenadon kaj enmiksiĝadon de ambiciaj aŭ fanatikaj aŭ simple interesitaj individuoj en la gramatikan, leksikan aŭ fonetikan strukturon de la internacia lingvo — kio riskas kompromiti ĝian unuecon kaj eĉ ekzistadon. La lingvo estas socia kontrakto, kaj tial ne apartaj individuoj, nek komisionoj, sed la tuta kolektivo, la tuta socia organismo, kiu ĝin uzas, rajtas kontroli ĝian evoluon kaj transformiĝon. Alprenante individuisman starpunkton, Svadost ofte forgesas aŭ subtaksas la unuarangan rolon de la kolektivo.

Kaj due, pri la antaŭkondiĉo de la „maksimuma perfekteco“. Tiun ĉi antaŭkondiĉon postulas ĉiuj aŭtoroj de novaj lingvoprojektoj, ĉiu el ili konsiderante sian propran modelon la plej perfekta. Alie ĝi estus tute nebezona. Estas tre bela kaj tre alloga la ideo pri la perfekteco ĝenerale, kaj speciale la ideo pri la perfekteco de la internacia lingvo, pri kiu Svadost parolas tiel entuziasme. Sed oni rajtas sin demandi: kiam do finfine naskiĝos kaj ĉu entute efektive naskiĝos tiu „maksimume perfekta“ modelo de internacia lingvo, pri kiu revas Svadost? Ankorau kiom da jaroj, kiom da jardekoj, kiom da jarcentoj la laborista klaso, la tuta progresema homaro devas atendi ĝis la apero de tia lingvo? Postuli tian kondiĉon de iu ajn lingvo — tio

ĉi signifas prokrasti la solvon de la problemo ĝis nedifinita tempo — ad calendas graecas. Kaj ĝuste tiun ĉi metodon sekvas la politiko de la lingva imperiismo: daŭrigante senfine kaj senrezulte la diskutojn pri la „maksimuma perfekteco“ de la internacia lingvo ĝi celas gajni tempon kaj motivojn por la propagando de siaj naciaj lingvoj.

Grammatici certant. . .

Cetere, tiun ĉi starpunkton adoptis ne nur la interesitaj potencoj, sed ankaŭ parto de la neinformita publiko, la aŭtoroj de novaj kabinetaj lingvoprojektoj kaj homoj kun diversaj antaŭjuĝoj. Ilia opinio resumigas en la jena silogismo:

„Ni akceptas la relativan superecon de Esperanto kompare al la aliaj lingvoprojektoj. . . Sed ni kontestas la lingvistikan valoron de Esperanto, nin ŝokas la manko de maksimuma, ideala perfekteco en via lingvo. . . La scienco, inkluzive la lingvoscienco, konstante kreskas, disvolviĝas, progresas. Estas tre probable, eĉ certe, ke post 10, 20, 50, 100. . . jaroj iu talenta, genia lingvisto aŭ kolektivo de kompetentaj lingvistoj, apogitaj sur la modernaj metodoj kaj la lastaj sukcesoj de la lingvoscienco kaj de la cibernetiko faros novan projekton de lingvo internacia, pli perfektan, pli riĉan, pli belsonan ol Esperanto. Tiam kio okazos al „nia kara Esperanto“? Kompreneble, la homaro preferos la pli modernan, la pli perfektan lingvon — kaj la tuta ĝisnuna giganta laboro, la tuta eposa batalo de la esperantistoj por la mondlingva ideo iros al la diabloj. . . Ĉu ne estas pli saĝe ŝpari tiun laboron, tiun valoran energion, uzi ĝin por pli realaj celoj, anstataŭ por vana utopio, kaj prokrasti la batalon, gardi niajn fortojn por pli oportuna momento, kiam iu pli perfekta planlingvo estiĝos? . . .“

Tiu ĉi ĝenerala opinio preskaŭ koincidas kun la pozicio (starpunkto) de Svadost: „Praktike la avantaĝoj de

Esperanto aspektas konsiderindaj kompare al la malgranda eksperimentado de la aliaj lingvoprojektoj aŭ kompare al la kompleta manko de tia eksperimento. Sed tiuj avantaĝoj, eĉ se ili sufiĉe multe kreskos dum la proksimaj jardekoj, perdos sian signifon, kiam aperos nova lingvo, inda je ĝenerala rekono“ (id., p. 147).

Al tiu ĉi tre ofta opono oni povas respondi tiel:

„Jes, prave, la scienco, inkluzive la lingvoscienco kaj la cibernetiko, konstante kaj senhalte progresas. Sed tiu ĉi kreskado, evoluo kaj progresado de la scienco certe ne ĉesos — ĝi sendube daŭros — ankaŭ longe post la kreo de tiu nova, „pli perfekta“, pli bela ktp. „cibernetika“ planlingvo aŭ „lingvo-sputniko“ (tiel Svadost nomas la artefaritan internacian „lingvon de la estonteco“), kiu „devas esti finlaborita en ĉiuj siaj detaloj ĝis tia perfekteco, kia povos esti atingita dum la historia periodo, kiun ni vivas“ (id. p. 123). Nu, la sama problemo, la sama probableco

eĉ certeco daŭre persistos ankaŭ por tiu ĉi „finlaborita ĝis plej alta grado de perfekteco“ lingvosputniko: ĝi ne povos haltigi la progreson, la kreskadon de la scienco. Post novaj 10, 20, 50, 100. . . jaroj la cirkonstancoj denove ŝanĝiĝos, naskiĝos iu nova, ankoraŭ pli genia lingvisto aŭ konstituiĝos kolektivo de ankoraŭ pli kompetentaj sciencistoj, kiuj, apogitaj sur ankoraŭ pli modernaj sciencaj metodoj kaj helpataj de ankoraŭ pli modernaj cibernetikaj aŭ aliaj maŝinoj, kreas ankoraŭ pli perfektan modelon de internacia lingvo. Do, la tuta laboro, ĉiuj penadoj por disvastigi la plej perfektan por sia epoko duan lingvoprojekton („sputnikon“) montriĝos vanaj. Por ŝpari niajn fortojn, ni devos do denove nin deteni de agado por la dua modelo, prokrasti la adopton de internacia lingvo kaj denove atendi 10, 20, 50, 100. . . jarojn ĝis la naskiĝo de la tria, de la kvara. . . ĉiuj pli perfektaj de la antaŭaj, ĉar la progreso de la scienco neniam ĉesos.

(Sekvas en n-ro 5)

KIO MANKAS AL NIAJ ELEMENTAJ E-KURSOJ

La komenco de la lingvolernado estas tre grava. Do, kiel komenci la lernadon de Esperanto — jen unu grava problemo de nia E-movado. S-ano V. Oljanov mencias prave la fakton, ke multe da homoj komencas, sed malmulte de ili daŭrigas la lernadon de Esperanto. Kiel klarigi tiun fakton? Ĉu nur per la manko de daŭrigaj kursoj? Tio estas kaŭzo, sed ne la unika kaj ne la plej grava. Ne malpli grava estas la komenca lernado de la lingvo.

Do, kiel komenci? Ĉu ni havas konvenajn lernolibrojn, kiuj garantias bonan kaj efikan komencon? Al mi estas konata nur la lernolibro de Sarafov—

¹ Vd. „Iuj metodikaj demandoj de la E-instruado“, Bulgara Esperantisto n-roj 10—11, 12/1974 kaj 1, 2/1975 j.

Hesapĉiev. Tiu lernolibro estas verkita laŭ la lernolibra tradicio: la lingva materialo estas distribuita laŭteme. Estas tradiciaj temoj: familio, laborejo, geografiaj nomoj ktp. Tia distribuo de la lingvomaterialo konvenas nur tiam, kiam oni celas preparadon de kursanoj por traduklaboro. Sed niaj kursoj ne estas tradukistaj, kaj tiu distribuo de la lingvomaterialo ne interesigas la kursanojn. Tiamaniere la lernado de la lingvo estas memcela. La lingvo per si mem ne estas celo, sed rimedo. La fama rusa pedagogo Uŝinskij diras, ke la memcela lernado de fremda lingvo estas senutila perdo de tempo. La lernado de lingvo devas riĉigi la spiritan vivon de la lernanto. Tio signifas, ke la lingvomaterialo devas esti tiamaniere distribuita, ke la lernanto povu



ricevi certajn konojn. Ĉu niaj kursanoj ricevas certajn konojn, kiam ili lernas laŭteme? „Marica estas longa rivero, Sofia estas granda urbo, Drjanovo estas malgranda urbo. . .“ Ĉu tiuj „konoj“ povas interesi la kursanojn? Respondo al tiu demando ne estas necesa.

Bonan komencon proponas s-ano Oljanov. La lernado de la lingvomaterialo laŭ la formulo $a+x=b$ faciligas la memoradon de la nekonataj vortoj. Sed tia komenco konvenas nur por la unuaj lecionoj. Plue izolitaj frazoj ne kontentigas la kursanojn. Ĉi-jare mi komencis per tiaj frazoj. La instruado vigligis la kursanojn, sed baldaŭ evidentiĝis, ke instruado per izolitaj frazoj ne estas bona. Mi komencis uzi la lernolibron de Sarafov-Hesapčiev. En la tekstoj la vortoj estas sence ligitaj kaj la senca ligo faciligas la memoradon. Sed la lernado de tekstoj nur pro la lingva materialo ankaŭ ne estas tre efika. Tia lernado baldaŭ komencas

enuigi la kursanojn.

Tial mi decidis komenci per malgrandaj rakontoj, per anekdotoj kaj ŝercoj. Sed (denove tiu „sed“) kie trovi tiajn tekstojn? En la lernolibro estas troveblaj kelkaj de ili, en „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ estas troveblaj.

Malfacila estus la tasko de la kursgvidanto, se li devus serĉi tekstojn por ĉiu instruado. Mi proponas, ke tiu problemo estu solvita de CK de BEA. Por la komencaj kursoj estas necesaj ne sekaj lernolibroj, sed aroj da malgrandaj rakontoj, fabeloj, anekdotoj, proverboj. Tiaj tekstoj kreas estetikan ĝuon ĉe la lernantoj kaj ne permesas al la enuo eniri la lingvoinstruadon. La lingvoinstruado per tiaj tekstoj ne estos enua. Mi scias, ke eldonado estas malfacila afero, sed stencile aperigi tiajn tekstojn ne estas malfacile.

Stojko Bojkov

v. Pištigovo, distr. de Pazarĝik

Mi recenzas

„SILEZIAJ KANTOJ“ DE PETR BEZRUC

Petr Bezruč — la fama silezia bardo, estas konata ne nur al la literatura elito de nia lando. Vasta legantaro same konis kaj konas liajn kantojn. Al li kaj al lia verkaro nia poeto Kiril Hristov jam en la komenco de nia jarcento dediĉis interesan artikolon kaj tradukis kelkajn el liaj kantoj.

Lige kun la 25-a datreveno de la liberiĝo de Ĉeĥoslovakio el la faŝisma jugo aperis esperantlingve la poemaro de Bezruč „Sileziaj kantoj“, realigita dank’ al la senriproĉa traduklaboro de la samideana triopo Tomaš Pumpr, Jiří Kořínek (Jirji Korjinek) kaj Rudolf Hromada.

Petr Bezruč (kun vera nomo Vladimír Vašek), kiu testamentis al la generacioj nemultnombran, tamen riĉegan lirikan heredaĵon, havas interesan vivon. La literatura sorto de liaj verkoj estas same neordinara. Ili estas eldonitaj multfoje, multlingve kaj ĉiam rikoltis sukceson ĉe la kritiko kaj ĉe la leganta publiko. Longan tempon Petr Bezruč kvazaŭ vegetis kiel ordinara ĉiutagulo — poŝtista oficisto. Sed iun tagon aperis la „Sileziaj kantoj“,

kaj lia stelo ekbrilis sur la literatura horizonto, por ke ĝi neniam estingiĝu.

La poezio de Petr Bezruč ludis gravan rolon en la bataloj de la ĉeĥoj dum la epoko de la ĉeĥa nacia renesanco. Tiu sileziano akuzas la jugon de la Aŭstra-Hungara Imperio kiel krimon kontraŭ la homa digno. Pro tio lia poezio estas kaj estos ĉiam aktuala. Ĉar ĝi resonas ne nur al la ĉeĥa demopsikologio, sed tiel same al la natura impeto de la sklavigitaj popoloj al libera vivo.

La lingvaĵo, per kiu la poeto ilustras siajn pensojn kaj ideojn, estas bildeca kaj malkovras la grandan trezorejon de la riĉanima silezia lirikisto. Lia kapablo observi kaj reale speguli la vivon de tiama Silezio estas mirinda.

La stilo de la poeto estas varia, la ritmo de la poemoj — firma, vipanta. El la kantoj ŝprucas giganta forto. En ili eĥas la krio de malespero, venanta el la nigra karboriĉa regiono kaj el la ardantaj ferfandejoj de Ostrava, kie 70 000 ĉeĥaj ministoj agonias sub triobla jugo de aŭstraj konkerantoj, polaj ekleziuloj kaj kapitalistaj ekspluatantoj.

La majstra plumo de Bezruč egale pentras kaj prikantas, meditas kaj agitas, vekas konscienciproĉojn ĉe tiuj, kiuj kliniĝas antaŭ la fremdlandaj moroj, lingvo kaj kulturo kaj emas forgesi sian nacian devenon.

La akuzo de Bezruč kontraŭ la denaciigantoj havas majestatan moralan forton. La alvoko de la poeto, tute homa kaj leĝpotenca, vipas la dormantan konscion de la ekspluatatoj kaj mobilizas la batalpretecon en tiuj centroj, kie la ĉeĥa nacia sento estas firma kaj rezistopova.

La esperantlingva eldono de liaj kantoj estas nova armilo por defendo de la homaj rajtoj de la homa ĝojo kaj feliĉo.

Prodan Prodanov

Noto de la Redakcio. La libron „Sileziaj kantoj“, enhavanta 72 poemojn, vi povas ricevi senpage de niaj ĉeĥaj amikoj.

Skribu al la adreso: Okrésni Lidove knihovna Nádražni okruh, 74 601 Opava, Ĉeĥoslovakio.

VERDAJ STELETOJ


LA SORTO DE TANJA



Dum la blokado de Leningrado en iu konstruaĵo estis trovita la taglibro de la 11-jara knabino Tanja Savičeva. La notoj, kiujn la infana maneto faris, rakontas kiel pro malsato mortis — unu post la alia — la membroj de la granda familio de Savičev. La lasta noto diras: „La Savičev-anoj mortis. Mortis ĉiuj. Restis nur Tanja.“

La postsignoj de Tanja mem perdiĝis. Kune kun aliaj infanoj ŝi estis evakuita el la sieĝita Leningrado tra la glaciiginta lago „Ladoga“.

Oni scias, ke Tanja estis evakuita en Gorkij-regiono duonviva. Multajn monatojn la kuracistoj batalis por ŝia vivo, sed ne sukcesis savi la knabinon. Ŝi mortis la 1-an de julio 1944.



CIFROGRAMO

1. Organo de la spirado (19 14 11 18 10).
2. Besto kun longega kolo (pluralo) — (9 3 2 8 15 10 7).
3. Unu el la voĉoj de la verbo (19 8 17 3 12 10).
4. Ĉefprofesoro de universitata fakultato (4 5 6 8 13 10).
5. Kiu kondukas aŭton (16 10 15 10 2 10).
6. Lernanto ho ma (11 5 2 13 8 13 1 10).

Post la deĉifrado enskribu la literojn en la koncernan ĉelon de la malsupra ĉeno da ciferoj kaj vi ricevos plej aktualan esprimon.

1	2	3	4	5	6	7	8	2	3	9	10	4	5	11	8	12	5	13	6	10	17	14	19	5
---	---	---	---	---	---	---	---	---	---	---	----	---	---	----	---	----	---	----	---	----	----	----	----	---

2	11	8	15	8	16	3	17	18	10

M. Băceș

Solvo de la gratulenigmo en № 1 : Feliĉan Novan Jaron!

FILA TELA ANGULETO



NI KOLEKTU POSTMARKOJN!

La kolekto de poŝtmarkoj estas agrable kaj utila okupo por multaj esperantistoj. Ĝi riĉigas la estetikan kaj ĝeneralan kulturon de la homo. La poŝtmarkoj spegulas originale kaj interese la historion kaj la ekonomion, la sciencajn kaj kulturajn atingojn de ĉiu popolo. Pri la poŝtmarko Georgi Dimitrov — la gvidanto kaj la instruanto de la bulgara popolo, diris, ke ĝi estas la vizitkarto de ĉiu lando antaŭ la cetera mondo.

Dum la jubileo por nia popolo 1974 jaro la filatelistoj ricevis 65 poŝtmarkojn kaj 3 filatelajn blokojn. La eldonitaj 15 serioj estas valoraj pro sia interesa kaj varia temaro, pro sia bona arta kaj poligrafia ellaboro.

La flaŭro de nia lando estis prezentita per serio de ĝardenfloroj de 1, 2, 3, 18, 20, 28 stotinkoj kaj bloko de 80 stotinkoj. La faŭno — per markoj de 1, 2, 3, 5, 13 kaj 20 st. Pri la pli gravaj okazaĵoj de monda kaj nacia signifo estis eldonitaj jenaj serioj kaj blokoj: „Monda ĉampionado de futbalo 1974“ — 1, 2, 3, 13, 18, 40 st. kaj blokoj; „IV-a Respublika Junulara Festivalo kaj Spartakiado“ —

1, 2, 3, 5, 13, 18 st.; „Balkanfilmo V“ — bloko de 72 st.; „Monda & Junulara Filatela Ekspozicio“ — 1, 2, 3, 28 st. kaj bloko de 60 st.; „Historio de Bulgario — 1974“ — 1, 2, 3, 5, 8, 13, 18 kaj 28 st.; „Popola verkaro-lignogravuraĵoj“ — 1, 2, 3 st. (triptiko) kaj 5, 13, 28 st. (kvadrato) „Monda grafikarto“ — 1, 2, 3, 5, 8, 13, 18, 28 st.; „Novjaro-1975“ — 2 st.

Per serio el du markoj — 2 kaj 18 st. — estis notita la 50-jariĝo ekde la morto de Vladimir Iliĉ Lenin kaj per 1 marko de 2 st. — la 50-jariĝo ekde la morto de Dimităr Blagoev. Lige kun la 100-a datreveno [de la unua en la mondo konferenco de la poŝtadministracioj en Bern estis eldonita la serio „Cent jaroj de la tutmonda poŝtista asocio 1874—1974“ el 2 markoj de 2 kaj 18 st. kaj bloko de 8) st.

Dediĉe al la 30-a datreveno de la plej granda evento en la historio de Bulgario — la Socialisma Revolucio — aperis serio de 5-koloraj poŝtmarkoj sub titolo „9-a de septembro 1944—1974“ (vidu supre).

Lasto Nikov



GARDU LA PACON!

Teksto: Asen Grigorov

Muziko: Dimitr Denčev



Gardu la pacon, homoj de l'tero!
Lumas la suno sur la ĉiel'.
Kia lazuro! Kia tenero!
Pulsas la vivo en ĉiu ĉel'.
Gardu la pacon! (2)

Viroj, virinoj de la planedo!
Gardu la vivon! Vivu en pac'!
Firme batalu kun kora kredo
kontraŭ milito, kontraŭ minac'!
Gardu la pacon! (2)

Blankaj kaj nigraj kaj flavaj: kune
paŝu antaŭen kaj sen hezit'!
Se ĉiuj homoj staros komune.
ni estos fortaj kiel granit'.
Gardu la pacon! (2)

DEZIRAS KORESPONDI

Anglio

Derik Robinson — 46 Orchard Rd, Bukam
au Cvauch, Esseks (pri E-movado).

Thony Shaw — 8 Station Road, South Ben-
fleet Esseks (pri E-movado).

Bulgario

Vasilka Tomajova — ĉitaliŝte „Zarja“, Has-
kovo (40-jara kantistino kaj muzikpedagogo
— kun ĉi pri arto, muziko, E-kantoj, lingvoj
k. a.).

Atanaska Vasileva Taŝeva — str. Patriarĥ
Evtimi 3, Haskovo (26-jara instruistino —
kun ĉi pri literaturo, arto, muziko).

Stojan Sejretov — kvartalo Sturgozia, bl.
5, etaĝo I, Pleven (juristo — kun ĉi pri ĉi
en Esperanto, rusa, franca, angla, itala).

Mustafa Elezov — v. Stojanovo, Loveŝko
(kun ĉi pri ĉi).

Trifon Stojnov — str. Ilinden 3, Loveĉ
(precipe kun jugoslaviaj aŭtoturistoj).

Colombia

David Correa Roldan — Carrera 83, 49 E-52,
Medellin (25-jara inĝeniero, fraŭlo — kun
gebulgarioj pri ĉi).

Ĉeĥoslovakio

Ladis Kralovec — 30/699 Plzen 1, post.
priĥi 56 (50-jara — kun ĉi pri ĉi, anekdo-
foj, bk).

GDR

Peter Lorenc — 943 Schwarzenberg Schnee-
bergerstr. 12(19-jara).

Torsten Waese — 943 Schwarzenberg, Str.
d. Einheit 52 (16-jara).

Richard Parys — 943 Schwarzenberg, Alte
Annaberger Str. 37 (19-jara).

Friedrich Meinhold — 9444 Rittersgrün, Son-
neberg 1 (24-jara).

Hungario

Csato Katalin — 3284 Tarnamera, Pusztá-
fogacs 80/a (17-jara lernantino en gimnazio —
kun gejunuloj el ĉi).

Du hungaraj knabinoj, 11-jaraj: Varga
Erzsebet kaj Major Agnes H-5123 Jászáro-
kszállás, Dobó uti iskola.



RIPOZKOMPLEKSO DE „BALKANTURIST“

SLÂNĈEV BRJAG

Situanta sur la bordo de malprofunda kaj kvieta golfo, meze de sablaj dunoj kaj abunda verdaĵo, Slânĉev Brjag (Suna Bordo) akceptas ĉiujare milojn da turistoj el ĉiuj landoj de la mondo.

La maro estas varma kaj agrabla por banado de majo ĝis la fino de oktobro, la naturo — bela kaj pitoreska, la hoteloj — kun interesa kaj originala arkitekturo.


En la komplekso estas multaj restoracioj kaj amuzejoj — danctrinkejoj „Variete“, „Rusalka“, „Zlatna Jabâlka“, „Hanska Šatra“, „Taljanka“, „Piknik“, „Stranĝanski Kolibi“, „Ĉučura“, „Fregata“ kaj multaj alij. Ili proponas al la turistoj agrablajn kaj neforgeseblajn horojn.

Por la ŝatantoj de sporto estas tenis-ludejoj, mini-golfejo, marvelocipedoj, bicikloj, keglaro, retpilkaj ludejoj k. a.

Je dispono de la junaj homoj estas danctrinkejoj, diskotekoj. La kultura vivo estas riĉa. Plej grandan intereson ĝuas la internacia festivalo „La Ora Orfeo“, okazanta en junio. En ĝi partoprenas estradaj kantistoj el la tuta mondo.

Ĉiujara folklor-festivalo prezentas la riĉon de la naciaj kantoj kaj dancoj de dekoj da landoj, ankaŭ la granda arto de la bulgara folkloro, rekonita tutmonde.

Slânĉev Brjag estas belega loko por amuzoj kaj ripozo.



Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krăstju KARUCIN Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Korektis: M. Conkovski

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Mihaly Kovács — ul. Achim 38, 5650 *Meröbereny* (25-jara — kun bulgaraj knabinoj pri ĉt).

Italio

Luciano Bonafe — Via P. Tibaldi 19, 40 129 *Bologna* (28-jara — kun gebulgaroj pri ĉt).

Pollando

Danuta Stablewska — 85—181 *Bydgoszcz*, ul. Rypinska 2 m 1 (21-jara — pri ĉt).

Nina Gomółka — Pagovzyna 52, 38—305 *Lipinki k/Bieczka*, pow. Galice (14-jara lernantino — kun ĉl pri ĉt).

Johano Tambor — ul. Kościuszki 25, PL — *Elk* (35-jara — kun gebulgaroj pri ĉt, esperantaĵoj, lernolibroj de Esperanto).

Waldemar Jakubiec — *Wrocław*, str. Dnekawska 4/30 (21-jara — kun ĉl pri literaturo, moderna muziko, sporto, kino, teatro, pm, bk, gram. diskoj, reciproka gastado).

Monika Wrona — 58—350 *Mieroszków*, ul. Żeromskiego 32/1, pow. Walbrzych, woj. Wrocław (22-jara — lingvoj, muziko, arkitekturo, turismo).

Zenon Przewoźny — 64—800 *Chodzież*, ul. 22 lipca 3/2 woj. Poznańskie, (20-jara — kun 19—20-jaraj bulgarinoj).

Eva Novak — poŝto 10—371 *Olsztyn* 1, urés Kieźliny 19, pow. Olsztyn, (18-jara — kun bulgaroj).

Janosz Parkitny — ul. Bema 14/20, 43—100 *Tychy* (18-jara — pri moderna muziko, kino).

Stanisław Staszewski — Al. woj. Pd. 37/39, 97—200 *Tomaszów Mazowiecki* (lernanto en aŭtomobila teknikumo — interŝanĝas magnet. bendojn, gr. diskojn, E-kantojn k. a.)

Sovetunio

Bela memoraĵo pri Ukrainio — la ridiga pupskatolo „Ukraina Kozako“ — tre sukcesis dum Montreala Mondekspozicio. Kiu volas ĝin ricevi, bonvolu sendi 100 belajn pm el okcident-eŭropaj landoj aŭ landoj de aliaj kontinentoj. (eĉ uzitaj) al: David Kolker, S-Kolcevaja 20—149, 330 058 *Zaporofje*, USSR.

Por si kaj por siaj belaj klubaninoj deziras amasajn korespond-proponojn E-instruisto D. Kolker (adreso kiel supre).

Anna Cibulska — Kosmiĉeskaja 120—11, *Zaporofje*, 330 058 (30-jara instruistino de kemio — kun instruistinoj).

L. Kolker — Esperanto klubo, p. k. 649 Poĉtamt, *Zaporofje* 330 000 (27-jara oficistino — pri ĉt, pm).

B. Riliškate — Utenos raj., 234900 *Saldu-tiškis*, Litovio (16-jara lernantino — kun junuloj el ĉl pri sporto, akioroj, estradaj kantoj, esperantaĵoj).

Kazays Grauzinis — Utenos raj. Vidurine mokykla 9 kl., 234900 *Saldu-tiškis*, Litovio (16-jara lernanto — kun junuloj el ĉl — pri Esperanto, sporto k. a.).

Rein Saag — *Viljandi*, Jakobsoni 36-1 (elektromekanikisto — pri lit-ro, insignoj, pm.).

Udo Uibo — *Viljandi* Side 5-1 (lernanto — pri lit-ro, insignoj, pm.).

Peeter Vaher — *Viljandi*, Uneveski 17-4 (seruristo — pri ĉt).

Vitalij Ĉijov — 197 183 *Ldningrad*, str. Sestroreckaja 3—9 (23-jara — pri arto).

Nina Sankova — 198 052 *Leningrad*, 7-a Krasnoarmejskaja 11—26 (25-jara — pri ĉt).

Marina Ŝamŝonkova — 196 128 *Leningrad*, str. Blagodatnaja 31—27.

NIAJ MORTINTOJ

La 28-an de januaro ĉ. j., post longa malsanado, forpasis

IVAN V. BATAKALIEV

multjara esperantisto, membro de CK de BEA, prezidanto de E-societo „Kulturo“ en Plovdiv, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo.

Naskita en 1911, Batakaliĉev frue komencis perlabori sian panon kiel kudristo. Kompreninte bone la kaŭzojn de la sociaj maljustoj, li jam en 1929 fariĝis membro de RMS (Jun-komunista Asocio) kaj en 1934 de BKP.

Ekde 1936 en Plovdiv li malfermis modestan propran kudrejon, kiu baldaŭ fariĝis loko, kie kolektiĝis la progresema E-junularo. Batakaliĉev mem aktive partoprenis la agadon de E-societo „Kulturo“, kiu estis severe observata de la polico. Li senĉese kaj entuziasme propagandis Esperanton.

En la peza kontraŭfaŝisma batalo (1941—1944) Batakaliĉev partoprenis kiel aktiva helpanto kaj kaŝanto de eksterleĝaj kamaradoj, kiel sekretario de partia grupo kaj de kvartala komitato de Patrolanda fronto en Plovdiv.

Post la popola venko je la 9. IX. 1944 Batakaliĉev aktive laboris kaj batalis por stabiligo

de la nova demokratia ŝtata povo, estante sekretario de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto en Plovdiv kaj de 1951 ĝis 1955 kiel unua sekretario de UK de BKP en Peŝtera.

Lerninte Esperanton jam en 1928, li entuziasme kaj prudente laboris por ĝi dum preskaŭ duonjarcento.

STEFAN JONĈEV

Li naskiĝis en 1908 en Samokov en multinfana familio de oficisto. En la gimnazio li akceptis progresivajn ideojn kaj aktive laboris en la societoj de esperantistoj, stenografoj kaj abstinuloj. Post la gimnazio li laboris kiel instruisto en Samokov kaj Sofio kelkajn jarojn, poste kiel bankoficisto.

Dum sia tuta vivo li estis aktiva, sindona esperantisto, membro de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ kaj de Bulgara Esperantista Kooperativo (ano de ĝia Kontrolkomisiono).

Ĉiam akurata kaj honesta kiel homo, sincera kiel amiko, laborema kaj fidela al Esperanto — tia Stefan Jonĉev restos en nia memoro.